La arkipelaga urbo estas tridimensia pingla tabulo, al kiu estas fiksataj urbaj fragmentoj, kiam ili estas trovataj. Ĝi transprenas la funkcion de muntajo, kiam ĝi estas perceptata kiel vida rakonto, urba analogio al la atlaso de Aby Warburg. Ĝi estas ekspozicio, kiun moviĝantaj vizitantoj, kiuj difinas sian proprajn trajojn, perceptu kvazaŭ pejzaĝon. En proprigo ĉiuokaza, Ungers refasonas Berlinon proprigante jam ekzistantajn aferojn per elektado kaj kolektado por montri ilin kiel sian ekspozicion.












Kiam Le Corbusier fasonis la tegmentoterason por Charles de Beistegui en Parizo, li kreis alitipan arkipelagon. Lia kolekto metodo ne estis fizika sed optika: li enkadrigis la rigardon super la urbon tiel ke nur iuj partoj estis videblaj kaj, per ilia vida izoleco, ŝajnis, ke ili troviĝis pli proksime ol ili fakte estis. De Beistegui kapablis krei sian personan ekspozicion pri Parizo per movado de la heĝoj, tiel reenkadrigante la urbon per montrado



Kuehn Malvezzi

Fari Arkipelagojn

Percepto-maŝinoj

de kelkaj elektitaj el ĝiaj disaj monumentoj kaj ignorante la gigantan interan ampleksecon de la urbo. Corbusier kreis plian plenskalan modelon de sia urbisma vizio, post kiam, jam kelkajn jarojn antaŭe, li ekspoziciis la *Plan Voisin* en formo de pavilono por la *Exposition des Arts Décoratifs*. Post kiam ili eniris en ĝin, la vizitantoj tute subite troviĝis en parto de la konstruaĵo Immeuble Villa, kiu estis plene meblita kaj kompletigita per teraso, kiu ofertis desupran rigardon al la parko. Ambaŭkaze Corbusier ebligis la vizitantojn percepti sian urban vizion rekte kaj ne per laŭskalaj modeloj, planoj aŭ bildoj. Li konstruis percepto-maŝinojn, kiuj, kune kun la *Raumstadt* de Kiesler, kreas genealogion de modernaj arkitektur-ekspozicioj kiel senperajn, plenskalanajn spacajn spertojn. Kun tiuj modeloj kiel bazo, la arkitektoj kuniĝis kun la grupo Independent Group en Londono post la Dua Mondmilito kun la celo starigi siajn proprajn demonstraĵajn ekspoziciojn, komencante per *Parallel of Life and Art* ĉe la ICA, tridimensia kolaĝo, en kiu ili uzis simplajn kopiojn de ĉiaj fotoj kaj bildoj, kiujn ili dise pendigis sur la murojn kaj de la plafonoj. La spertota spaco fariĝis la ekspoziciaĵo mem, dum la rolo de la partoprenantaj artistoj kaj arkitektoj—ĉi-okaze Eduardo Paolozzi, Nigel Henderson, kaj Alison & Peter Smithson—fariĝis tiu de kuratoraj fasonistoj. La ekspozicio sekvis tiun de El Lissitzky nomata *Kabinett der Abstrakten* kaj la ekspozicion *Exposition Internationale du Surréalisme* en ĝia totaliga fasonado de la spaco kaj ankaŭ en ĝia kunlabora kaj kolektiva produkto-procezo, en kiu partoprenis unu skulptisto, du arkitektoj kaj unu fotisto. Okazis ŝanĝo: dum fotografio kaj spaco reciproke ĉirkaŭas unu la alian, la prezento kaj la ekspoziciaĵo komencas oscili. Kunlaboro fariĝis centra temo dum la kreado de ekspozicioj, kiam aŭtoreco ekestis ĝuste intere de la diversaj fakoj, oscilante inter arkitekturo, skulptado kaj fotografio.






*'Gropius verkis libron pri gren-siloj,
Le Corbusier verkis unu pri aviadiloj,
Kaj Charlotte Perriand portis novan
objekton al la oficejo ĉiumatene,
Sed hodiaŭ ni kolektas reklamajojn.'*

Kuehn Malvezzi


Fari Arkipelagojn

Fotografia spaco






La Smithsonian-oj konsciis pri la paradigmo-ŝango, kiu okazis en arkitekturo pro la forta efiko de bildoj en modernaj amas-komunikiloj. Kolektante amase produktitajn reklamajojn kaj fiksan ilin al sia pingla tabulo por rigardi ilin ĉiutage, ili konfrontis sin kun la nova bildaro. Tamen en la ekspozicio *This is Tomorrow – Patio and Pavilion* en la Whitechapel Gallery, ili zorgeme pritraktis la fizikan spacon, uzante reflektantajn lado-vandojn kun rustika lignokabano en la centro, dum ili lasis Henderson kaj Paolozzi pritrakti la fotojn kaj objektojn, kiuj estis montrotaj ene de la spaco. Laŭ maniero malsama al tiu de Mies ĉe lia ekspozicio en la MoMA, en kiu li uzis gigantajn pligrandigitajn fotojn por krei plenskalan spaco-sperton kaj tiel kreis bildojn, kiuj fariĝis arkitekturo, kiel sia fundamenta strategio de prezento, la Smithsonian-oj interesiĝis plie pri la interrilata momento. Ili alparolis kunlaboron kiel momenton de transiro, konsiderante sian arkitekturon kaj finita kaj nefinita. Onidire, forvojaĝinte al la CIAM-renkontiĝo en Dubrovnik, ili ne superrigardis la finkreadon de la instalajo fare de siaj artisto-kolegoj, tiel donante liberecon al ili esti unuaj enloĝantoj kaj uzantoj de sia instalajo. Tiamaniere, ilia spaco fariĝis kondiĉa prezento, sed ankoraŭ ne plene finkreita objekto, kiu atendas ĝian kompletigon per ĝia uzo. Kiel plia esprimo de fasonado per tradukado, la kolektiva aŭtoreco starigita en tiu ekspozicio montras arkitekturon kiel ion, kio estas kaj fakrilata kaj senlima, kaj tiucele kolektiva formo de arto. La esprimplenaj materiaj surfacoj de *Patio and Pavilion* spegulas brutalisman sentemon, kiu donas al la ekspoziciejo la pozicion de aktiva ĉeesto, al kiu la artverko devas reagi kun la sama grado de engaĝiĝo.



1. 2. 3. 4. 5. 6. 7. 8. 9. 10. 11. 12. 13. 14. 15. 16. 17. 18. 19. 20. 21. 22. 23. 24. 25. 26. 27. 28. 29. 30. 31. 32. 33. 34. 35. 36. 37. 38. 39. 40. 41. 42. 43. 44. 45. 46. 47. 48. 49. 50. 51. 52. 53. 54. 55. 56. 57. 58. 59. 60. 61. 62. 63. 64. 65. 66. 67. 68. 69. 70. 71. 72. 73. 74. 75. 76. 77. 78. 79. 80. 81. 82. 83. 84. 85. 86. 87. 88. 89. 90. 91. 92. 93. 94. 95. 96. 97. 98. 99. 100.



1. 2. 3. 4. 5. 6. 7. 8. 9. 10. 11. 12. 13. 14. 15. 16. 17. 18. 19. 20. 21. 22. 23. 24. 25. 26. 27. 28. 29. 30. 31. 32. 33. 34. 35. 36. 37. 38. 39. 40. 41. 42. 43. 44. 45. 46. 47. 48. 49. 50. 51. 52. 53. 54. 55. 56. 57. 58. 59. 60. 61. 62. 63. 64. 65. 66. 67. 68. 69. 70. 71. 72. 73. 74. 75. 76. 77. 78. 79. 80. 81. 82. 83. 84. 85. 86. 87. 88. 89. 90. 91. 92. 93. 94. 95. 96. 97. 98. 99. 100.



Kuehn Malvezzi

Fari Arkipelagojn

Responde al la deziro de David Chipperfield, ke *Common Ground* estu ekspoziciata ĉe la 13a Venecia Arkitekturbienalo, estis realigitaj du intervenoj konstruitaj en griza stakoforma brikajo ĉe la enirejo de la Palazzo delle Esposizioni ĉe la Giardini. Ambaŭ intervenoj difinas sojlon, unu en la konstruado kaj la alia ekstere, malrapidigante la rektan eniron en la konstruaĵon. Estis kreitaj du specifaj lokoj, kiuj invitas la vizitantojn renkontiĝi kaj pasigi iom da tempo, sidiĝi kaj rigardi. La ekstera loko estas soklo, kiu ĉirkaŭas arbon, kiu troviĝis tie jam antaŭe. Ĝi sidas sur la

Ekspozicii Komunan Fundamenton

ŝtupoj, kiuj gvidas al la centra enirejo. Ĝi troviĝas kontraŭ la aleo kaj la portiko, kaj tial povas esti uzata kiel benko kaj aktivigas la vojeton antaŭ la Palazzo kiel renkontejon. Ĝia en-konstruata kontraŭparto troviĝas en la unua salono post la vestiblo, la historia Sala Chini, kiu estis ŝanĝita tiel ke aksaj movoj de unu flanko al la alia estas interrompataj. Tio kreas devojiĝon al centra spaco, kiu havas la samajn dimensiojn kiel la soklo ekstere. Kiel kavo eltranĉita el la volumeno de la konstruado, la spaco markas Z-forman trairvojon, kiu gvidas de ambaŭ flankoj al ĝia centro. Ambaŭ intervenoj estas plenskalaj modeloj de arkitektura spaco, kiuj agas kiel stacioj dum traĵo. Per la uzo de briko kiel unuigan materialon ĉie, en- kaj ekster-konstruaj, horizontale kaj vertikale, la surfacoj ŝanĝiĝas de ekspozicifono al arkitektura ĉeesto, difinante spacon kaj samtempe esprimante sian materialan objektecon. La brikoj estas kuŝigitaj vertikale, kaj iliaj larĝaj supraĵoj estas turnitaj al la salono kaj havas minimumajn juntojn. Rezulte de la brikbakado, ĉiuj el la brikoj havas iomete malsamajn dimensiojn kaj kolorojn. La dimensioj de ĉiu briko estas 22,5 × 10,6 × 4,85 cm, kaj ilin produktis Petersen Tegl en Broager, Danio, brikfarejo ekzistanta de pluraj jarcentoj. Tiu dum la pasintaj tridek jaroj evoluigis metodojn por produkti brikojn laŭ nuntempaj teknikaj normoj kaj samtempe konservi la ecojn de la historiaj brikoj. *Komuna Fundamento* koncernas ankaŭ la rilaton inter la arkitektura objekto kaj ĝia fizika konstruado, inkluzive de la produktado de la materialo, ĝia transportado kaj la maniero kunigi kaj konstrui ĝin surloke. Kadre de la kunlaboro kun Petersen Tegl, estis elektita briko D99, malhelgriza briko kun variaj kolornuancoj, kiun oni produktas surbaze de la ordinara ruĝa briko farita per loka argilo en Broager. Ĝian koloron oni atingas per inversigebla oksigen-redukta procezo aplikata al la ruĝa briko.



Kuehn Malvezzi

Fari Arkipelagojn

Candida Hofer kaj Armin Linke ambaŭ estas artistoj, kiuj laboras en kaj per spaco. En ilia fotografio, spaco fariĝas materialo, kiu estas manipolata, misformigata kaj rekunmetata. Krome, intervenoj en ilian laboron okazas ne nur en la momento, en kiu foto estas farata, aŭ ĉe la postprilaborado. Intervenoj okazas ankaŭ dum iliaj ekspozicioj, pro la individuaj

La instalajo

manieroj, laŭ kiuj ĉiu artisto prezentas siajn fotojn per enkadrigo kaj instalo en specifajn mediojn. Laŭ tiuj individuaj manieroj, fotoj estas ekspoziciataj per spaca intervenado, en kiu arkitekturo ludas aktivan rolon. La du fotistoj partoprenas la instalprocezon dekomence, ĉar iliaj laboraĵoj estas tre grandparte integrigataj en la arkitekturan strukturon.

La foto, kiun Hofer faris de la Lauder-akademio en Vieno, montras angulan fenestron. Tiu laboraĵo estas integrigata en la muroj kovritaj per brikoj, tiel ke ĝi mem fariĝas fenestro: la interrompo en la griza brik-surfaco, la tranĉo de bildokadro en ĝin, ebligas, ke la fotita situacio estas starigata en la reala sperto-spaco.

La fotoj de Linke, kiuj apartenas al la projekto *Performative Architectures*, eniras la spacon kiel moviĝantaj montraĵoj, kiuj estas pendigitaj meze de la salono. Dek ses bildoj estas montrataj en du travideblaj kadroj, kiuj estas instalitaj je certa angulo tiel, ke estiĝas vidaj muntaĵoj por la moviĝanta vizitanto. Montrante la spacon kaj la monstro-manieron mem, la kunmetitaj fotoj estas aranĝitaj en grupoj, kiuj kreas siajn proprajn rakontojn, kiam rigardanto perceptas ilin sinsekve. Kune kun la grizbrika medio, tiuj bildoj kreas plian bildon, integrigante la brik-surfakon en la konstelacion kiel interan spacon.

Hofer kaj Linke aliras arkitekturon de kontraŭaj direktoj, kaj ilia kombinita prezento en la Sala Chini kreas ian heterogenan ordon, en kiu iliaj artverkoj ricevas aŭtonomecon kaj samtempe interagas per sia konkreta instalajo. Arkitekturo estas ekspoziciata kiel parto de kuratora ago en spaco, kiu estas nek malfono nek fono sed transformilo de la intero. Sekvante la logikon de tradukado, la instalita arkitektura spaco kreas rilaton inter kontraŭaj bildaroj veninte el pluraj aliaj lokoj. Ĝi kreas eĉ plian arkipelagon.









Candida Hofer

Lauder Business School Wien III 2004



Armin Linke

Armin Linke, Cinema screen, Guiyu China 2005

Armin Linke, Parque del Retiro, Madrid Spain 2011

Armin Linke, Carlo Mollino, Teatro Regio, Torino Italy 2005

Armin Linke, Miodrag Zivkovic, Memorial Complex Šumarice, Broken Wing – Monument to Executed Pupils and Professors, Kragujevac Serbia 2010

Armin Linke, Venetian Hotel, Las Vegas (Nevada) USA 1999

Armin Linke, G8 Summit, Genova Italy 2001

Armin Linke, Segantini Museum, St. Moritz Switzerland 2004

Armin Linke, Thongil Street, Pyongyang North Korea 2005

Armin Linke, Ettore Sottsass, Lego house in studio, Milano Italy 1999

Armin Linke, Kashiwazaki Kariwa Nuclear Power Station, children play room Kashiwazaki Japan 1998

Armin Linke, Wild Blue, swimming pool, Yokohama (Tokyo) Japan 1999

Armin Linke, NASA Jet Propulsion Laboratory, Mars Yard, Pasadena (California) USA 1999

Armin Linke, Water shop, Nukus (Aral Sea) Uzbekistan 2001

Armin Linke, CNR National Research Council, Fermi conference hall, on the wall the Globe made by Fra' Mauro in 1460, Roma Italy 2007

Armin Linke, Museum, drawings of the Tower of Babel, Babylon Iraq 2002

Armin Linke, Roman Cities Project, Fori Imperiali, Roma Italy 1999

































Hila Peleg parolas kun Armin Linke

Por la prezentado de Kuehn Malvezzi ĉe la 13a Arkitektura Bienalo en Venecio, Armin Linke estis invitita montri elektitajn fotojn el sia arkivo. La arkivo konsistas el fotoj faritaj dum la ampleksaj vojaĝoj, kiujn la artisto faris ĉirkaŭ la mondo. Dum lastaj jaroj, tiuj fotoj estas distribuitaj kaj ekspoziciitaj en multaj malsamaj kunteksto, formoj kaj spacaj aranĝoj, en artaj kaj arkitekturaj ekspozicioj, libroj, retaj eldonadoj, kaj aliaj lokoj. Kiel fotisto, Armin Linke senĉese reagordas la manieron, en kiu liaj bildoj rilatas unuj al aliaj, kaj restrukturas la manieron de ilia prezentiĝo.

Hila Peleg La plej forta impreso, kiun oni ricevas kiam oni rigardas viajn fotojn, estas ke malantaŭ la lenso de la fotilo troviĝas granda vojaĝanto. Kiaj estas la motivoj de viaj vojaĝoj? Kiel vi elektas viajn vojaĝcelojn? Kion vi serĉas?

Armin Linke Mi vojaĝas vaste al lokoj, kie la teknologio ŝanĝas la pejzaĝon, por vidi, kiel tiuj ŝanĝoj influas la manieron, en kiu la homoj vivas en tiaj terpartoj. Dum iom da tempo, mi rigardadis lokojn, kie fortaj ŝanĝoj efektiviĝis sen teknologio aŭ per memorganizado, ekzemple demalsupre organizitaj urbaj strukturoj. Plej lastatempe, mi vojaĝis al lokoj, kiuj jam submetiĝis al popularaj amaskomunikiloj kaj estis jam tre bone konataj dank' al dokumentaj komunikilaj bildoj. Mi provis fari

malrapidan rigardon, kaj inkludi detalojn el interna vidpunkto, por defii konvencian komunikilan raportadon.

En miaj projektoj, mi provas esplori, kiel oni uzas la spacon, kaj kiel la infrastrukturoj estas realigitaj. Tio komenciĝis antaŭ dek kvin jaroj, kiam mi legis en itala gazeto pri la Barajo Tri Gorĝoj, kiu estis konstruata en Ĉinio. Tiutempe mi ankoraŭ loĝis en Milano. Tio, kio interesis min, estis ne nur la impona arkitektura konstruo de la barajo, sed la fakto, ke du milionoj da homoj estos delokigitaj, kio signifis, ke oni devos konstrui novajn hejmojn kaj tutan novan infrastrukturon por grandega nombro da homoj. Tio egalas inundi urbegon proksimume tiel grandan kiel Milano, kaj rekonstrui ĝin aliloke. Mi sentis, ke tio estis historie interesa, kaj ke oni devus ĝin dokumenti, kune kun la lokoj detruotaj, transformotaj kaj rekonstruotaj.

La vojaĝado estas esenca al mia praktiko, sed nur kiel speco de terenlaboro. Por foti, oni devas fizike esti en la spaco, kiun oni volas dokumenti. Komprenoble, dependas de la projekto, kaj oni ne nepre devas vojaĝi malproksimen. Ekzemple, mi nun faras projekton pri tio, kiel la spaco estas uzata antaŭ mia domo. Mi loĝas antaŭ la konstruaĵo de la Eldonejo Axel-Springer, kiu eldonas la taggazeton *Bild*, do mi interesiĝas pri la maniero en kiu oni uzis la straton dum la 1a de majo (Tago de la Laboro) kaj la 2a de majo, kiam okazis jarcentiĝa celebrado por Axel Springer, la fondinto de la eldonejo: du okazajoj preskaŭ samtempaj kaj en preskaŭ la sama spaco, kiuj kreis du tre malsamajn portempajn infrastrukturojn. Iam, oni devas vojaĝi malproksimen, sed foje la interesaj eventoj okazas tuj antaŭ la okuloj.

HP En ĉi tiu prezentaĵo vi elektis montri dek ses fotojn, kiujn vi aranĝis en kvar grupojn el po kvar bildoj. Ĉu vi povus rakonti la historion de ĉiu foto? Kaj pri iliaj apartaj rektangulaj apudmetadoj?

AL La unua grupo koncernas pejzaĝojn. En la supra maldekstra angulo, ni havas foton de arkitektura instalaĵo dum la Pintkunveno de G8 en Ĝenovo (Italio 2001). En la bildo oni vidas ordinaran arkitekturon, tamen ŝanĝitan per okulfrapa interveno. Ĉi tiu muro estas parto de krado de ĉirkaŭ 450 disigaj bariloj, kiujn oni instalas portempe tra la urbo. Kiam oni faris la foton, nenio specifa estis okazanta. Ĉi tiu superkonstruaĵo, kiu trarandis la tutan urbon, estis ankoraŭ konstruata. En la fono, estas tre eleganta itala arkitekturo de la 1930aj kaj 40aj jaroj, kaj jen ĉi tiu giganta barilo enmetita inter ĉi tiuj konstruaĵoj, kun homoj moviĝantaj ambaŭflanke. Temas pri la teatriĝo de la spaco, kaj du malsamaj strukturoj, kiuj ankaŭ estetike difinas la urban spacon—du specoj de

interkruciĝantaj kradoj. Dum la unua baras la spacan logikon de la alia, ili konekzistas dum certa periodo da tempo.

La sekvanta bildo estis farita ĉe la Venecia Hotelo en Lasvegaso (Nevado, Usono 1999). La intenco estas ke la akvo ligu, tamen vide ĝi disigas. Ĉi tio kuntrenas estetikan elekton. En ambaŭ bildoj estas linioj tra la bildo, konektantaj aŭ malkonektantaj. En ambaŭ, estas certa situacio kaj aldonaĵo enmetita en medion, krucaĵo inter naturo kaj artefarito. Plie, en ĉi tiu foto farita en Lasvegaso, oni ne scias, ĉu tio, kion ĝi priskribas, estas modelo aŭ la originalo. Estas dislokiĝo en spaco, tempo, kaj kunteksto.

La tria foto estas de Tongil-strato, Pjongjango (Nord-Koreio 2005). Mi estis tie okaze de interŝanĝo inter la Arkitektura Akademio de Nord-Koreio kaj itala arkitektura universitato. En ĉi tiu foto, oni povas vidi ankaŭ la idealon de modernismaj modulecaj strukturoj: nubskrapuloj, longa strato, larĝaj vicoj da fenestroj - arkitektura respondo al la Olimpikoj en Seulo en 1988. Interese estas, ke ĉi tiu strato povas esti uzata kiel flughaveno militcele. Do, ĝi kapablas transformiĝi en ion alian. Kaj ĉar ne estas tre multaj homoj en la strato, ĝi ankaŭ aspektas kiel sceneja dekorado kun ekstruloj. Evidente ĝi estas prilokigata, sed ĝi ankaŭ estas bildo en si mem, de idealo de moderna sociala loĝigo. En ĉi tiu grupo, estas tri malsamaj formoj de arkitekturo: la kopio de Venecio, la faŝisma arkitekturo en Ĝenovo, kaj la propaganda sociala loĝejo en Nord-Koreio. Esence, tri modernismaj momentoj.

La kvara parto de ĉi tiu grupo estas bildo de la Muzeo Segantini, Sankta Maŭrico (Svislando 2004). Oni vidas vizitanton rigardantan pejzaĝon, pentraĵon de pejzaĝo, kiu staras en artefarita spaco - galerio de muzeo. Al mi gravis inkludi ĉi tiun bildon en la grupo, ĉar la rotondon de la muzeo oni ankaŭ povas rilatigi al la spaco de la centra bienala pavilono, Padiglione Italia. Estis plano, ke Segantini kreu panoraman 360-gradan pentraĵon por la Pariza Ekspozicio en 1898—pra-kina distra arkitekturo kaj enprofundiga situacio, kiu estis financota de hoteloj en Engadino, sed la engadina vilaĝo Pontresina sin retiris, kaj ĝin oni neniam konstruis. La tuta ideo estis krei en Parizo 'pra-Lasvegason' de la svisaj Alpoj de Engadino.

La dua grupo estas simila, sed anstataŭ eksteraj spacoj, ĉiuj estas internaj spacoj, kiuj ankaŭ tre temas pri prezentado. En la unua bildo, tablon kaj seĝojn superrigardas mapo de la terĝlobo farita de Fra Mauro en 1460, eble unu el la unuaj bildoj de tutmondiĝo. Travido kaj elvido per kartografio, kiu figuras la mondon—aŭ tian, kia oni ĝin imagis. Ĝi estas sciencfikcio el la pasinteco, ekstero el aliaj tempo kaj spaco,

kiu nun funkcias kiel konstanta ĉeesto, en kunvenejo en la CNR Nacia Konsilio pri Esplorado, la Fermi Konferenca Halo, Romo (Italio 2007). La bildo estas parto de la Projekto Romaj Urboj, Fori Imperiali, por kiu mi fotis la arkitekturojn de ĉiuj institucioj, listigitaj en la itala konstitucio.

La sekvanta bildo estas elmontraĵo en butiko, kie oni vendas akvon, en Nukus, Arala Maro (Uzbekistano 2001), kie de la 1960-aj ĝis la 80-aj jaroj oni konstruis multajn apudlagajn konstruaĵojn por produkti kotonon, kio fine kaŭzis ke la lago retiriĝis je 50%. Nuntempe ne estas akvo, do oni devas iri al ĉi tiu butiko por ĝin aĉeti. Tio, kio interesas min, estas la fakto, ke ĝi estas bildo de loĝistiko. Vi vidas la manieron, en kiu la akvo estas elmontrata, kiel ĝi estas pakita, la fakton, ke ĝin oni devas transporti, ke la akvon oni devas filtri kaj paki en botelojn.

La tria bildo estas farita en la Babilona Muzeo (Irako 2002). Ĝi estas fascina loko, kun elmontraĵoj konsistantaj el samforma elemento, kiuj montras historiajn bildojn de la babilona turo. Efektive ĝi estas serio da lumskatoloj, formo de prezentado, kiun oni multe uzas ankaŭ en la arto. En la lasta bildo, la Fori Romani, ni vidas la muzeiĝon de malferma spaco, kaj jen ni havas ĉi tiun afiŝon, kiu priskribas rekonstruon de la spaco malantaŭ si. Denove, tre teatreca, kaj denove ĝi kreas fenestron inter la interno kaj ekstero, pasinteco kaj estonteco, realo kaj figuro.

En la sekvanta grupo ni havas la temon de laboratorioj, kvankam ne ĉiuj el la bildoj estas faritaj en laboratorioj. Eble temas pri mensa strukturo, pri kreado de modeloj por io aŭ re-kreado de situacio en neatenditaj lokoj. Wild Blue, naĝejo en Jokohamo (Tokio, Japanio 1999), prezentas artefaritan tropikan insulon. Ĝi rekreas certan etoson; aŭ prefere, ĝi reproduktas certajn aspektojn sen la neceso nove formi la tutan situacion. Ĉi tio ne estas por sciencaj celoj, sed por ripozo kaj distro. En tiu senco, la laboriloj de laboratorio estas uzitaj por rekonstrui kaj testi situacion por krei konsumisman okazajon.

La supra bildo estas infanĝardeno, kiu ankaŭ funkcias kiel eduka muzea elmontraĵo por junaj infanoj ene de nuklea centralo, en Kasiwazaki-Kariwa (Japanio 1998). Ene de ĉi tiu sama instalaĵo troviĝas sep centraloj. La elmontraĵo klarigas, kiel oni uzas la nuklean energion. Iusence ĝi estas propaganda instalaĵo: ĝi montras, kiom sekura estas la teknologio. En iu senco, ĝi estas laboratorio, en kiu oni ludas—kun la absurda trajto, ke ĉi tiu loko estas ene de la nuklea centralo.

La bildo sur la malsupra parto de la elmontraĵo montras la rekonstruon de loko: ĝi estas modelo de malgranda parto de la surfaco de la planedo Marso. Ĝi troviĝas en la Reakci-pelada Laboratorio de NASA, Mars Yard, Pasadena (Kalifornio, Usono 1999). Sur ĉi tiu terena modelo oni testis la Marsajn Esploraĵajn Vagulojn (Rovers).

La lasta bildo en ĉi tiu grupo estas domo el Lego-brikoj, kiun mi trovis en la laborejo de itala arkitekto kaj dizajnisto Ettore Sottsass, Milano (Italio 1999). Mi vizitis al Ettore Sottsass, kaj ni faris portretojn en lia ateliero. Do, mi pasigis la tutan tagon kun li. Mi ankaŭ kunportis tre malgrandan momentfotilon, kaj dum mi faris tiun alian laboron, mi mapigis, por tiel diri, la atelieron, kiel mian propran... Kaj kelkajn bildojn mi vere ŝatis, ĉar ili estis pli intuiciaj, kun la beleco de hajko anstataŭ la klasika, rafinita fotografia bildo. Kompare kun pli heroaj pejzaĝoj aŭ panoramaj bildoj, ili figuras la skizon.

La kvara grupo komenciĝas per Guiyu (Ĉinio 2005), loko, kie komputiloj el la tuta mondo estas recikligataj. Oni invitis min labori tie kun iu filmreĝisoro, kiu uzis la lokon por fari muzik-filmeton. Dum mi iris tra la urbo, mi trovis kinejan ekranon, kiu pendis kvazaŭ skulptaĵo, interrompo en publika spaco, sed ankaŭ maniero aktivigi la spacon. Ĝi estas kineja ekrano farita el tolo—trovita objekto kaj samtempe interveno.

Sur la sekvanta bildo estas la Parque del Retiro, Madrido (Hispanio 2011) kun arboj formtonditaj, ankaŭ speco de skulpta interveno, sed pli institucia kaj tre malsama, ĉar ĝi estas la Reĝa Ĝardeno, do ĝi estas arkitektura ilo. La bildo havas ankaŭ filmecan karakteron.

La tria foto estis farita ĉe la Jasenovac-Monumento (Kroatio 2010). Ĝi troviĝas sur la loko de la koncentrejo Jasenovac de la faŝisma Ustaŝa reĝimo dum la dua mondmilito. Ĝin fasonis arkitekto Bogdan Bogdanovic, kiu uzas betonon kiel organan simbolon, en 1966. Aparte interese estas vidi kiamaniere la pejzaĝo estas uzata, kaj kiel la historiaj spuroj de la koncentrejo estas forviŝitaj kaj transformitaj en estetikan vidaĵon de ĝardeno. Mi ŝatas la ideon adopti estetikan demarŝon, anstataŭ ekspluati fortajn emociojn aŭ insisti pri la negativa, eduka flanko.

La kvara bildo de la kvara grupo estas Teatro Regio, Torino (Italio 2005) far arkitekto Carlo Mollino, okulfrapa inĝenierarta majstroverko, kaj, en la malantaŭo, la Mole Antonelliana, alia ekscentra konstruaĵo en Torino, kiu estis konstruita kiel sinagogo kaj nun estas transformita en muzeon pri kinarto.

Ĝi kreas strangan dialogon inter skulptaj arkitekturoj, kiuj konstruiĝis por malsamaj funkcioj en la socipolitika sfero de la urbo.

Plaĉas al mi la ideo, ke vidpunkto generas dialogon. La vidpunkto el la supro de la konstruaĵo mem videbligas la pendigilon (*fly tower*)—teknologian aparaton, kiu ordinare estas kaŝita. Mi ŝatas la manieron, en kiu Mollino transformas ĉi tiun skatolon en skulptan momenton. Do, ĉi tio estas malpli klasika arkitektura foto, ol bildo, kiu atentigas pri la infrastrukturo de la teatra spektaklo.

Mi rigardas ĉi tiujn kvar bildojn kiel teatrajn platformojn. La bildoj inkludas elementojn, kiuj ne estas klasikaj arkitekturaj elementoj, sed tamen ili estas tipaj urbaj dekoracioj, vidataj en tute malsamaj situacioj.

HP Kiel vi priskribus la fortan engaĝiĝon de via fotografia praktiko kun la arkitekturo? Kaj kiaj estis la apartaj konsideroj, kiuj agis sur via elekto de la fotoj por arkitektura ekspozicio?

AL Antaŭ ol mi fariĝis fotisto, mi deziris fariĝi arkitekto. Por mi, la fotoj estas iom kiel etendaĵo de arkitekturo. La arkitekturo, por mi, temas pri la uzo de la spaco. Mi interesiĝas pri fotoj, kiuj montras la manierojn, en kiuj la homoj estas tuŝataj de la spaco, la spaco kiel speco de lingvo, kaj la manierojn, en kiuj ili rilatas al ĝi.

La elekton por la Bienalo mi faris kune kun arkitektoj Kuehn Malvezzi, specife por la spaco, kiun ili fasonis. Ilia prezentaĵo situas meze en la ekspozicio *Common Ground* de David Chipperfield en la Arkitektura Bienalo. Ili fasonis arkitekturan instalaĵon en la ĉefa pavilono de la Giardini, kiu estas brika Z-forma konstruaĵo—do estas tre forta spaca kaj struktura notacio. Ni provis trovi bildojn, kiuj iel rilatas al tipaj bildoj de arkitekturo; ili devis diri ion pri arkitekturaj strukturoj. La bildoj devis krei dialogon kun la arkitekturo sen fariĝi klasikaj arkitekturaj bildoj.

La bildoj, kiujn ni elektis, ne estas por figuri arkitekturajn fasonojn. Ili estas ekzemploj de iuj arketipoj de spacoj, kiuj ĉiuj estas artefaritaj produktaĵoj, kaj kiuj diras ion pri la teknologiaj, sociaj, kaj ekonomiaj strukturoj, kiuj ilin produktis. Kvankam la bildoj ne funkcias por dokumenti la arkitekturon, ili tamen volas ekestigi diskuton pri la arkitekturo. Ekzemple, en iuj bildoj oni povas vidi ian malsukceson de modernisma utopio; estas diversaj tavoloj de historiaj momentoj, kaj hodiaŭ, iuj el la lokoj en la fotoj estas jam tute transformitaj, kompare kun la fazo, kiam oni planis kaj konstruis ilin.

HP Por ĉi tiu prezentaĵo, vi presis 16 bildojn sur fotografian paperon de identa formato, lasante neregulajn blankajn marĝenojn. La fotoj estas poste muntitaj dorsaldorse, aŭ fronte unu al la alia, ene de enkadritaj vitraj paneloj. Tiuj grandaj travideblaj surfacoj estas pendigitaj de la plafono en la griza brika konstruaĵo de Kuehn Malvezzi. Ĉu vi povus diri ion pri la elekto de formato, kaj pri la specifa modula karaktero de la prezentaĵo?

AL Dum la lastaj kelkaj jaroj mi evoluigis sistemon por trakti grandajn nombrojn da bildoj, ĉar pli interesas min montri grandajn grupojn da aranĝitaj fotoj ol ekspozicii unuopan bildon kiel klasikan artobjekton. Plaĉas al mi la ideo de muntado de bildoj: uzi la spacon de la galerio kiel specon de muntadmaŝino. La muro estas kvazaŭ bildoscenaro de filmo, kaj, ĉar ĉiu spaco estas malsama, oni bezonas ian modolon, simile al softvaro por filmomuntado kiel Final Cut.

Mi havas modolon de blanka fotografia papero je 50 x 60 cm. Ekzemple, se mi elektas la bildon de Lego de Sottsass, kiu estas 35mm-a negativfilma momentfoto, mi uzas tiun formaton por prezenti ĝin kune kun klasika plakformato (10 x 12 cm), aŭ panorama formato. Esence, tio permesas al mi ligi bildojn de tute malsamaj fonoj kaj fotilaj teknikoj, ĉiu fotilo havas sian propran diagonalan formaton. La fotografio tiam prezentiĝas kiel instalaĵo, kaj, per la rimedo de enkadriĝo, kiel parto de la spaca muntadilo.

Ordinare, kiam oni presas bildon sur fotografian paperon, oni emas adapti la kadron tiel ke ĝi havu ĝuste la samajn mezurojn kiel la bildo, kaj oni vidas nur la foton, kiu estas tiusence la efektiva artobjekto. Ankaŭ eblas uzi paspartuon, kiu jam estas parto de la enkadriĝa rimedo, kaj maskas ĉion, krom la bildo. Ĉi-kaze, ni komencas per la fotografia papero, kiu estas ĝenerale vendata je norma grandeco de 50 x 60 cm. Por meti la bildon en ĉi tiun modolon mi difinis regulon, ke, se la bildo estas horizontala, ĝi komenciĝas ĉe la supro de la folio de fotografia papero, kaj se la bildo estas vertikala, ĉe la maldekstro. Esence, tio ĉi estas grafika rimedo, kaj ne estas tiom multe uzata en la arto. La formato de la papero estas industriigita. La fotografio estas industriigita procedo, kaj per uzo de ĉi tiu normo, mi igas la teknikan reproduktadon de la bildo rekonebla.

La bildoj prezentataj ĉi tie estas ĉiuj el malsamaj periodoj, kaj estas faritaj per tute malsamaj fotiloj kaj negativaj formatoj. Jen unu el la kialoj de la blankaj marĝenoj; tio estas, la bildo aŭ la fotografia papero estas traktata kiel modulo, en kiun la bildo estas enmetita. Kiam ni konsideris, kiel elmontri la

bildojn, ni ne volis nei la modolon. Aliflanke, ni ne volis, ke la bildoj interagis rekte kun la grizaj brikoj de la pavilono, pro diversaj kialoj: la brikoj estas tre forta elemento kaj, kompreneble, ni ne troviĝas en la kutima, neŭtrala blankkuba situacio, en kiu oni atendus, ke la bildoj estu muntitaj sur la muro. Sekve, la ideo estis fari la prilaboradon en la spaco anstataŭ sur la muro.

Unuflanke, ni volis efektiviĝi certan malpezecon, ŝvebantantan strukturon pendantan de la plafono, kiu rivelas la framon, kiu kaj disigas kaj ligas la spacon kaj la bildon. Aliflanke, la kadro gravas por doni al la bildoj skulptan fizikecon, por ke ĉi tiuj malpezaj paneloj ne perdiĝu ene de ĉi tiu eksplicite determinita spaco. La kadro ankaŭ provizas certan fokuson, kiel metodo enkadriĝi enhavon.

Intuicie, multaj el ĉi tiuj bildoj havas kradon, kiel brikojn aŭ interkruciĝojn, kaj mi esperas, ke ĉi tio, kune kun la travideblaj elmontraj elementoj, vere kreas ligon al la fizika spaco. Plue, la elmontrado de la bildoj en vitroŝrankoj transformas ilin en artefaktojn; eblas diri, ke la bildoj fariĝas antropologiaj dokumentoj. Mia fotoarkivo certe povas esti rigardata kiel studo pri tio, kiel oni uzas la spacon kaj kiel oni lokas la simbolojn por difini sociajn kaj politikajn strukturojn kaj procezojn.

HP Estas nenia eksplicita mobilizado de la politiko en viaj fotoj. Kio estas politika en viaj verkoj?

AL Al mi, la produktado kaj prezentaĵo de bildoj estas rimedo por fari demandojn, prefere al priskribi situacion aŭ propagandi ideologion. Kvankam tia fotografio eble ŝajnas esti proksima al la afero de dokumenta fotografio, ĝi provas iri pli antaŭen per la maniero, en kiu ĝi starigas demandojn, ĉefe per la provizo de spaco, en kiu la spektantoj povas enscenigi siajn proprajn ideojn pri spaco.



















Kinestetikaj rakontoj

Arkitekturo ne estas nur platformo, kiu akomoda la vidsubjekton. Estas vidmekanismo, kiu produktas la subjekton. Ĝi antaŭvenas kaj kadras sian enestanton. Ekzemple, la internoj de Loos: tie ŝajnas esti scenejo atendanta la scenon. Sed disiĝo inter fizika kaj vida percepto okazas, kaj dum la rigardo estas orientita, la vojo povas esti barita. Estis kreita situacio de ekspozicio, en kiu la loĝanto estas kaj vidanto kaj vidato, depende de ties vidpunkto. Eĉ se teatreca, ne temas pri teatro sed pri ties malo. Loos transformas ĉiun situacion, eĉ kaj ĉefe la hejman internon en paradigman muzean staton.

Muzeoj estas kontraŭarkitekturo. Temas pri spacoj, kiuj ne taŭgas kun sia uzo ĉar ili estas tipologiaj hibridoj. Tipaj muzeoj estas spaco konstruita por alia uzo ol ekspozicii, unue kun la Uffizi, ofica konstruejo, kiun Vasari fasonis por la Medičoj kaj kiu eĉ konservis la nomon de sia originala uzo, kiam la supera etaĝo estis transformita en muzeon. Fine de la 18a jarcento, palacoj kiel Luvro en Parizo estis transformitaj en muzeojn, dum la 20a jarcento vidis la industriajn tenejon progresi kiel arta ekspoziciejo. Estas kompreneble muzeoj fasonitaj kaj konstruitaj tiucele, kaj tute konscie: Dulwich Picture Gallery, Altes Museum, Guggenheim, Neue Nationalgalerie, Beaubourg estas ekzemplaj inventoj. Sed se oni pli bone konsideras tiujn modelajn muzeojn, kio igas ilin samaj, tio estas iliaj diferencoj.

Ili ne apartenas al genealogia serio, en kiu ili informas unu la aliajn, sed pli verdire reliefigas unuope. Ili havas komune tipologian referencon al konstruaĵoj ekster la muzea sfero, kaj estas similaj nur en tio ke ili ĉiuj estas proprigoj de heterogenaj fremdaj tipologioj: Soane proprigis la studion, Schinkel la templon, Wright la pluretaĝan parkejon, Mies oficejan konstruaĵon, kaj Piano/Rogers la fabrikon.




La efemereco de muzea tipologio estas kaŭzita de la nestabileco propra al la maniero, kiel ĝi strukturas percepton. La rigardo kaj fizika movo en spaco de moviĝanta subjekto ne estas hierarkie organizita, same kiel kun teatraj strukturoj, kie la spektanto estas senmovigita kaj flankenlasita el la ago sur la scenejo. La vidanto de ekspozicio estas jetita en situacion, libera ĉar ties movo en spaco estas nedeterminita, kaj laŭ la tempo permanente realĝustigita depende de la momenta percepto. Se la teatra vido baziĝas sur distanco kaj antaŭpreparita tempo-organizo, la ekspozicia vido estas informata de nuneco kaj engaĝiĝo: la publiko moviĝas tra la spaco kaj tie estas neniu stabila scenejo, la vidanto estante kaj spektanto kaj aktoro. Tiu perspektiva strukturo disigas la rigardon el la fizika movo. Ĝi generas vidaksojn, kiuj ne taŭgas kun la irenda vojo sed kontraŭas ĝin. Estas ŝanĝo, kiu okazas ekde kiam la modelo de baroka ĝardeno por teatra percepto estas defiata de la pejzaĝa ĝardeno, konstitua ŝanĝo por nasko de ekspozicio-farado.



Konstelacioj: Nuntempa Städel Muzeo en Frankfurto

La arkitekturo de ekspozicio, kaj pli ĝenerale de muzeo, estas afero de urbismo, fokusante pri spacaj rilatoj, trajtoj kaj infrastrukturo anstataŭ singularaj arkitekturaj eventoj. Ekspozicio estas urba modelo aŭ modela urbo. Ĝi estas kaj plenskala kaj skala modelo kaj tial povas esti komprenata kiel prototipo. Same kiel urbaj pejzaĝoj, ekspozicioj akomodas heterogenon, en kiu singularaj eventoj estas diversaj kaj tamen konektitaj per kuratora principo: garantiante ĉioman konstelacion, kiu kunligas diversajn elementojn, ĉiu ekspoziciaĵo havas sian aŭtonomecon. La koncepta propono de Oswald Mathias Ungers por verda arkipelago argumentas favore al urbismo, kiu sekvas la kuratoran modelon: elektante morfologian partojn de la ekzistanta konstruita strukturo kaj izolante ilin per forviŝo de la intero, estos generata kolekto de morfologiaj eventoj, en kiuj la unuopaj partoj estas aŭtonomaj insuloj, ĉiu sekvanta siajn proprajn internajn regulojn. Argumente favore al diverseco, la modelo de Unger promocias la ĉeeston de heterogenaj partoj kaj samtempe alvokas urbiston, kiu estante kuratoro elektus kaj kunligus la diverĝajn elementojn. La ŝlosila koncepto pri ordo tie estas konstelacio: strukturi urban pejzaĝon laŭ tre preciza konfiguracio de la volumenaj rilatoj signifas superforti figur-fonan logikon favore al spaca vido en kiu la intera spaco estas nun tiom grava kiom la konstruitaj partoj.

La ekspozicia arkitekturo por la kolektado de nuntempa arto en la Städel Muzeo de Frankfurto sekvas la konstelacian modelon: libera konstelacio de kuboj. Estante spacoj ene de spaco, la kuboj estas lokitaj en la muzea vastigajo same kiel konstruaĵoj en urbo, kreante aŭtonoman ekspoziciejon ene de ĉiu el iliaj internoj. La ĉambroj de la artisto kaj la kuratoritaj ĉambroj estas disvolvitaj sendepende, ĉar iliaj eksteraj muroj formas trian spacon unu kun la alia. Same kiel urbaj skvaroj, kiuj formas sinsekvojn laŭ la movo de la vizitanto, ekde kiam fizike travivitaj, la interaj spacoj kreas koregrafiojn inter la ĉambroj de ĉiuj artistoj. Tra malsimetriaĵaj vidaksoj kaj movdirektoj inter la kuboj, vizitantoj travivas la muzeon kiel dinamikan kunmeton de spacoj.



Konstelacioj: Documenta11 de Okwui Enwezor

'Tio, kion ni taksis tute ekscita pri tio estis la logiko de la kruzado de la spaco kiel ia urba dizajno. Ne tiom temas pri la galerioj, sed estas ia spaco, kiu havas certajn valorojn, kiuj rilatas al komunumoj, socialeco, demokratia spaco, aŭ la ideo de la placo ekzemple. Kaj poste la stratetoj, tra kiuj vi moviĝas kaj poste eniras en tiujn panoramojn, kiuj formas la galeriojn. Ni estis vere kvazaŭ prenataj de la surprizigaj turnoj de la dizajno prezentita, ĉar tio, kio estis implica aŭ esprimita specife ne estis nur simple kruzsystemo, sed la subjektiveco de la vidanto. Ekspozicioj estas vere kruzadoj. Ili estas metaforoj pri kiel ni paŝas de io al io alia, por ke vi havu tiun interrilaton inter tempo kaj spaceco konstante enskribitan kun la halto kaj la movo, tiel kreante rakonton, ligan inter formoj, ideoj, bildoj, konceptoj. Ekzistas vojo, en kiu la rakonto estas konstante reludata de la spektanto, kio estas esence la vojo, laŭ kiu funkcias kuratoraj planoj.'

Okwui Enwezor, 2009

Documenta estas portempa muzeo. La arkitekturo por Documenta11 estis konscia hibrido de du ĉefaj spacaj rakontoj informitaj de la kinestetikaj tipoj de la tredo kaj de la galerio. Tio estas unuflanke rekta fluanta movo de spaco al spaco, same kiel tiu de la Dulwich Picture Gallery, kaj aliflanke movo laŭ koridoro kaj konektanta kaj disiganta la

spacojn, same kiel kun la Uffizi. Ambaŭ kinestetikaj principoj estis intertekstaj disigante la singularajn spacojn el ĉiu alia, enŝovante koridoron intere, kaj lasante la enirejojn fronti unu la alian. La rezultanta strukturo havas karakterojn kaj de galerio kaj de tredo per interbredado, kiu generas hibridon de ambaŭ identecoj. Konsekvence, la movo de la vizitanto tra la ekspozicio estas diversa kaj ĉiu individuo kreas sian subjektivan trairon, kunmeto de decidoj en ĉiu spaco, ĉu por sekvi la fluon de la tredo, ĉu por turni (mal)dekstren en la koridoron kaj iri al specifa spaco nepasinte tra la aliaj.




La arkitekturo por Documenta11 estis disvolvita en procezo engaĝanta unue la kuratorojn kaj poste la artistojn de la ekspozicio. Ankoraŭ, estas urbista modelo ankaŭ pri kiel la diversaj protagonistoj estis engaĝitaj. Anstataŭ difini finian formon dekomence, la unua fasono estis moduleca matrico bazita sur supermetado de la movoj de ambaŭ vizitantoj. Diference de ĉefplano en tio ke ĝi ne difinas figur-fonan aŭ volumen-spacan rilaton sed realigas strukturajn principojn simile al la reguloj de ludo, la plano por Documenta11 povas esti legata kiel modelo de procez-rilata urbismo. Laborante ene de tiu modelo, la kuratoroj specifikis la nombron de unuopaj spacoj kaj destinis la unuajn ĉambrojn al specifaj artistoj, la bezonoj de ĉiu artisto determinante la dimensiojn de la

spacaro. Proksimeco de specifaj artistoj kaj pozicioj, kaj de distanco kun aliaj, povus esti produktita per la spacaj rilatoj ene de la plano. Por la sekvanta etapo, la artistoj mem estis engaĝataj. Same kiel loĝantoj reklamiantaj pri siaj hejmoj, ili ofte defiis la asignojn de la kuratoroj kaj eĉ la dimensiojn de la singularaj ĉambroj. La aranĝo trapasis kontinuan reellaboron ĝis estis trovita pli kompleksa ordo, kiu reflektis la elektitan proprigon de ĉiu spaco far la ekspoziciata artisto. Sed la intereso, kiun prenis la artistoj pri la aliaj spacoj estis tre limigita. Konsekvence, la interaj spacoj restis sub la respondeco de la kuratoroj kaj arkitektoj. La publika spaco, kiu malfaldiĝas intere de la unuopigitaj ĉambroj ne estas neŭtrala rezidua spaco sed estas komplementa homologaĵo, kie la vizitanto povas sin senti hejme: la sojlo ene de kiu memoro naskiĝas. Same kiel kun la ŝtupoj al la Kapitola Placo far Mikelanĝelo, la malrapida percepto de la placo konstruiĝas paŝo post paŝo, komencante ekde la plej malalta punkto kaj ŝanĝante dum oni grimpas sur la ŝtuparoj por krei rakonton. La ŝtuparoj spektakligas la placon kaj fariĝas ties prezento.

Nuntempa Städel Muzeo en Frankfurto























Tipologia Híbrido: Documenta11




































Francesco Garutti parolas kun Kuehn Malvezzi

FG En via laboro, vi montras vian kapablon kritiki kiam vi traktas temojn kiel 'rakontado' kaj 'rivelado'. Ne gravas ĉu la koncerna spaca problemo rilatas al prezentotaj artverkoj, al konservendaj objektoj, al rivelado de specifa pejzaĝo, aŭ al ellaborado de fizika kadro por endoma arkitekturo. Viaj projektoj ĉiam kapablas konstrui kaj formi sin mem: ili produktas teorion kaj rivelas sinsekvon de momentoj en spaco kaj tempo, kiuj instigas la vizitanton malkovri rakonton. La fasonado de ĉiu arkitekturajo sekvas kuratorecan modelon por la ellaborado de la framo, kadro kaj spaco: la projekto disvolviĝas kiel ekspozicia temo. Mi jam menciis vian kritikeman konsciecon, kiu difinas vian sintenon al fasonado de spaco. Nun mi petas vin pritrakti en ĉi tiu mallonga interparolo ne nur la rektan rilaton inter kuratora fasonado kaj eksponado, sed ankaŭ provi redifini la formon, rolon kaj framon de la moderna ekspozicio kiel kultura ilo.

Ĉi tiuj demandoj estas speciale interesaj en ĉi tiu momento de transformado de artismaj labormanieroj kaj super ĉio de instituciaj formoj kreitaj por gastigi kaj prezenti al publikoj la diversstipajn ekspoziciilojn. Mi ne volas tuj analizi la demandon pri spaco, la eblan fasonadon de la ekspozicia spaco; mi unue ŝatus prezenti la problemon en inversa perspektivo, kaj enfokusigi la atenton al la aktoro kompletiganta la fasonadon de la ekspozicia spaco, nome la publiko. Hipoteze mi ŝatus prezenti

tri eblajn 'poziciojn', tipojn de vizitantoj, kiuj jam kreis diversajn ekspoziciajn tipojn kaj el kiuj estontece povus naski aliajn ekspoziciajn arkitekturojn.

La vizitanto estas perfidulo.

(‘Every spectator is either a coward or a traitor’, Frantz Fanon, The Wretched of the Earth, 1963).

En sia mallonga eseo *Is a Museum a Factory?*¹ Hito Steyerl venas al fascina konkludo pri la rilato inter la ekspoziciado kaj enhavo de Documenta11, okazaĵo por kiu vi respondecis pri la ekspozicia fasonado kaj la aranĝado de la ekspoziciejoj. La filmmaterialoj en la spektaklo estis tiel abundaj, ke neniu vizitanto dum la centtaga okazaĵo povus sukcesi vidi ĉiujn prezentitajn filmojn. La sola alternativo estus la anstataŭigado de la rigardo de unuopa spektanto per la rigardoj de multaj spektantoj. Per la okuloj de komunumanoj, kiuj poste dividi inter si la spertojn de la spektaklo, rekonstruante fragmentojn kaj segmentojn kaj tiel provante rekunmeti la tutan organison. Steyerl substrekas, ke partaj spertoj, la fragmentoj de ebla bildomozaiko, povus esti prilaboritaj ĝis aliaj, senfinaj sinsekvoj kaj kombinoj: la amasa vizitanto havas la eblon kunigi kaj rekombini bildojn kaj tiel ĉiu spektanto iĝas konkuratoro. Via ekspozicia fasonado precize kongruas kun ĉi tiu protokolo, respondante al la neceso diversiĝi la uzeblojn de spaco, prezentante specimenojn de ĉiu variaĵo, klasifikante kaj uzante ilin denove en la disponeblaj ejoj.

Ĉi-teme min plej fascinas la eblo imagi al si la kapturigan bildon de ekspozicio, kiun ne eblas plene percepti, ĉar la rigarda sperto povas esti nur parta, nekompleta. La vizitanto estas instigata, eĉ devigata, 'perfidi' la veron, ĉi-kaze la kinematografian veron, de la spektaklo. Ĝis-ekstreme eluzi ĉi tiun kuratoran kaj spacan modelon povus konduki al interesaj kaj neatenditaj rezultoj. Kion vi pensas? Ĉu eblas imagi al si spacan, kiun eblas sperti laŭ senfina gamo de variaĵoj?

KM La perceptado de la vizitanto estas la elirpunkto de nia fasonada metodo, kaj perceptado estas firme ligita kun la moviĝado de la korpo. Spaco en si mem estas mensa koncepto, ne ia objektiva donitaĵo. Ĝi ekzistas nur en tiu grado en kiu ni praktike povas krei ĝin. Tial, kiam ni fasonas ĝin, ni tuj pensadas pri la senfinaj manieroj en kiuj vizitanto povas krei konkretan spacan, kaj ne nur pri la rezultanta objekto, kiu deekstere povas ŝajni arkitektura ejo. Tiusence la spaca fasonado povas havi malferman formon kun tre precizaj, de ni difinitaj fizikaj parametroj, sed sen ajna antaŭfiksita itinero. La uzantoj de la spaco fariĝas kunaŭtoroj, ĉar ili kreas sian propran

itinero, sian propran rakonton en spaca kaj tempa senco. Kiam oni invitis nin konkursi por la aranĝado de Documenta11, ni devis trovi manieron trakti la vastan skalon de la ekspozicio sen scii kiaj estos la artaĵoj. Tio estis malfacila tasko, ĉar la gvidlinioj estis tre ĝeneralaj, kvankam oni samtempe insistis pri la eblo prezenti ajnan tipon de komunikado. Tiu lasta postulo necesigis tre specifajn solvojn. Anstataŭ fasoni ekspoziciejojn por specifaj prezentoj, ni speciale atentis pri tipoj de translokiĝado de vizitantoj. Ni distingis du ĉefajn tipojn de translokiĝo: seninterrompa (la ekvivalento de la klasikaj salonvicoj), t.e. la eblo seninterrompe iri de unu ejo al la sekva, kaj interrompa (la ekvivalento de la klasika galerio) ĉe kiu la itinero estas raciigebla uzante koridorojn. Tiel ni donis al la vizitantoj du ilojn, du tipojn de translokiĝado, kies senfinaj kombinoj povas produkti senfinan nombron da rakontoj. Ni fasonis ne nur la hardvaron, sed ankaŭ la softvaron, la uzmanieron. Pro tio, ke la vizitantoj ne povas vidi ĉion, ili devas perfidi en tiu grado, ke ili devas elekti kaj kombini. La vizitanto do iĝas parto de la sperto, la kunaŭtoro, la konkuratoro en la senco kiun vi ĵus priskribis.

La vizitanto estas subaŭskultanto.

FG La projekto pri la rakontado, komunikado kaj prezentado de dOCUMENTA (13) baziĝas sur alia kaj same interesa logiko. La spektaklo emas neniam plene prezenti sin al la okuloj de la publiko: la larĝaj standardoj inter la kolonoj de Fridericianum estas forigitaj, la grafika fasonado de la afiŝoj en la urbo Kaselo celis konsisti nur en serio de grandaj koloraj rektanguloj. Multajn artaĵojn oni malkovru, atendu, serĉu. Ekzemple la Ĉina pavilono en Auepark, kiu estis kreita kiel vivejo por verkistoj, estas klara metaforo por la ideo pri spaco kaj tempo specifa por dOCUMENTA (13). La spektaklo ŝajnas ekvivi kiel la projekto de la kuratoro kaj intelektula kunlaborantaro kiu ĝin kreis kaj elpensis, urĝante la publikon subaŭskulti rakonton, anstataŭ esti ties protagonisto. La klara distanca spaco inter la publiko kaj la artaĵo estas, samtempe, loko por mirado kaj renkontiĝado. Ne estas arkitektoj en la kunlaborantaro de dOCUMENTA (13). Mi volonte imagus al mi kiel fasoni ĉi tiun spacan de akordiĝado kaj neado, eluzante ĉi tiun kuratoran modelon kiel strategion. Ĉu arkitekto rajtas plenumi ĉi tiun rolon? Kion vi pensas?

KM La fakto ke arkitekturo ne estas videbla kaj ne estas menciata, ne signifas, ke ĝi ne ekzistas. Kaj oni ne ĉiam bezonas arkitekton por arkitekti. Kiam oni kreas ekspozicion, certe ĉiam ekzistas spaca projekto. Ni konstatas, ke roloj evoluas: kuratoroj, iam nur historiistoj kaj specialistoj, pli kaj pli iĝas kvazaŭ reĝisoroj de surscenigendaj spertoj en kiuj kombiniĝas

semantikaj kaj pragmatikaj aspektoj, sperto-reĝimoj de la artaĵoj. La vizitanto de la ekspozicio trovas ne nur manieron rilati kun la artaĵoj, sed ankaŭ kun ilia prezentado kaj tial ankaŭ kun la retoriko de la prezento. La limo inter la artaĵo kaj ĝia prezentado povas ankaŭ dissolviĝi aŭ nebuliĝi. Ĉi tiu situacio kreas kampon en kiu artistoj, kuratoroj, kaj de tempo al tempo arkitektoj, kunlaboras por fasoni ekspoziciojn kaj prezentojn. Ni nomis ĉi tiun kunlaboron inter la diversaj fakoj Kuratoro Fasonado, ĉar en ĝi kombiniĝas heterogenaj aktivaj. Sed ni revenu al via ideo vidi la situacion el la vidpunkto de la vizitanto: ene de la pragmatika lingvistika kadro, ni vidas la personan kuntekston de la vizitanto-leganto kiel plua aspekto de la artaĵo, konsiderante la fakton, ke legado estas pragmatika ago.

La vizitanto estas ambigua partoprenanto.

FG Kiel arkitekto rilatu kun transformiĝantaj artismaj labormanieroj? Kiel arkitekto povas refasoni spacan por artaĵoj fare de artistoj kiuj strategie kaj enhave ŝanĝas kuntekstojn kaj malkonstruas la subtilajn barojn inter realeco kaj fikcio? Ĉu estontece eblas fasoni muzeojn por spektakloj de Tino Sehgal, aŭ por spektakloj kiel *Resistance* (2006) de Roman Ondák?

KM La problemo pri novaj labormanieroj kaj ilia rilato kun muzea spaco ekestis antaŭ longe kun Fluxus kaj kun agoj konataj kiel Institutional Critique. Agoj, prezentoj kaj efemerco jam en si mem kontraŭas la ideon de ekspoziciejoj. Kio restas, estas la dokumentado de la agoj, de la okazaĵoj kaj prezentoj, kiuj siavice iĝas artaĵoj. La Rusa pavilono ĉe la Venecia Bienalo en 2011, kies kuratoro estis Boris Groys, prezentis artaĵojn fare de Andrei Monastyrski kun la nomo *Empty Zones* Malplena estas la adjektivo per kiu Monastyrski difinas la agon kaj la prezentadon. Ĝi estas malplena, ĉar ĝi estas nereala kaj falsa, kaj ĝi iĝas reala nur per la dokumentado. La dokumentado mem estas do tio, kio koherigas la artan agon. La fotoj, tekstoj kaj videaĵoj aperas ne kiel solidaj objektoj, sed kiel simboloj lasantaj spacan por libera interpretado. La prezentado de la dokumentado iĝas siavice simbolo enigita en reton de referencoj kaj interrilatoj.

FG Ĉi tiuj konsideroj, viaj tri eblaj tipoj de vizitantoj kaj la realaj aŭ imagitaj kuratoraj modeloj, igas nin esplori la problemon pri spaco ne nur kiel la ĉirkaŭaĵon en kiu okazas la ekspozicio, sed ankaŭ kiel realan materialon pri kiu disponas la kuratoro. La artaĵoj transformiĝas kaj samtempe, kaj super ĉio, ŝanĝiĝas ankaŭ la komunikadaj strategioj por tiuj artaĵoj. Tio signifas, ke ŝanĝiĝas kaj multiplikiĝas la reĝimoj laŭ kiuj oni rilatas kun

la artaĵoj kaj laŭ kiuj oni spertas ilin. En tiu kunteksto ŝanĝiĝas la rolo de la spaco, kiu akceptas novan funkcion en la logiko kaj konstruado de la prezentado². Via rolo, la apliko de Kuratoro Fasonado, ŝajnas esti pli grava ol iam ajn antaŭe.

Vi menciis la kunaŭtoran rolon de la spektanto, la nestriktecan kaj intence nebulan limon inter artaĵo kaj ĝia prezentado en rilato kun la labormanieroj de hodiaŭaj artistoj, la unuigon de la vakuo destinita por la prezento-agoj kaj la prezentado de ĝiaj spuroj aŭ dokumentado. Ĉiuj el tiuj konsideroj donas precizan indikon uzeblan en klopodoj difini vian ideon pri arkitekturo. La spacoj kiujn vi fasonis por artaĵoj ofte enhavas interesan gradon de ambigueco. Unuflanke ili estas fasonitaj por precize difinita kunteksto, dank' al via uzo de diversaj aparatoj ĉe la limoj de videblo; aliflanke ili ŝajnas esti preskaŭ nekompletaj, malfermaj al neantaŭdireblaj uzmanieroj. La alloga estas mistera kaj malfacile malĉifrebla. La imponaj vakuoj kaj la agoroj disponitaj por la konkurso de Berliner Stadtschloss donas ekzemple signifon al la rekonstruado de la kastelfasado. La vakuo estas la spaco kun multaj ebloj kaj, samtempe, ĝi ludas centran rolon donante signifon kaj povon al la monumenta rekonstruado de la muzea fasado. Ĉu vi povus priskribi kiel vi en ĉi tiu kaj aliaj projektoj uzis la vakuan kiel centran spacan?

KM La agoro de la kastelo Berliner Stadtschloss estas bazita sur la ideo de Schinkel pri kreado de rilato inter la kastelo kaj la muzeo Altes Museum: ĝi estas malplena sojlo, kiu per sia permeablo provas doni kuntekston al la muzeo. La rilato estas antaŭ ĉio bilda: el la agoro oni povas vidi la kuntekston entenantan la katedralon kaj Altes Museum. Ĉirkaŭ la nova konstruaĵo, ĝi kreas kuntekston, senhierarkian konstruaron.

En la projekto por la pligrandigo de la muzeo Weltkulturen Museum en Frankfurt, ni evitis monolitan arkitekturan elirpunkton kaj decidis krei arkipelagon konsistantan el ekzistantaj kaj aldonitaj konstruaĵoj. La interkonstruaj vakuoj ricevas novan signifon kaj kreas streĉitecon inter la diversaj funkcioj. Nia gvida koncepto estas kompleksa, senhierarkia unuo kongruanta kun la konstruajaro kaj la arkipelago: temas pri tio kion Smithsonian-oj nomas ankaŭ 'konglomerata aranĝo'. Iliaj projektoj estas ĉiuj bazitaj sur centra vakuo kapablanta krei rilatojn inter disiĝantaj realaĵoj.

FG La strategioj de artistoj por distribui ideojn grave ŝanĝiĝis. Ŝajnas, ke opakeco kaj kaŝitaj, intence nelogikaj kanaloj estas komunikaj reĝimoj preferataj al klareco. La arta sistemo estas bazita sur subtila gamo inter la ĉeesto kaj foresto de komunikado. Ĉu vi povas trakti ĉi tiun temon en rilato kun la pligrandiĝanta rolo, kiun ludas grafikaj en la difinado de

instituciaj identecoj? Ĉu vi povis diri ion pri tio en rilato kun la projekto por la galerio Schirn Kunsthalle?

KM Artaj projektoj povas ludi kun la ambigueco inter foresto kaj ĉeesto de komunikado, sed institucioj estu tre bone videblaj. Schirn Kunsthalle estas gravega institucio en Frankfurt, kiu organizadas ekspoziciojn por amasaj vizitantoj. Max Hollein, la nova direktoro, petis nin en 2002 ĝisdatigi la stilon de Kunsthalle. Ni ellaboris la projekton kune kun la grafika artisto Chris Rehberger, ĉar la kliento postulis ne nur funkcie senchavan renovigon, sed ankaŭ novan, facile uzeblan gvid-sistemon. Ni pripensis la eblon kombini la du postulojn, kreante supermezuran, pseŭdomonumentecan signaligon: lumantaj murojn entenantajn surskribojn indikantaj diversajn funkciojn. La ideo estis transigi la surskribojn, kutime troveblajn sur arkitekturaj planoj, en skalo de unu por unu, kaj porti la dudimensiecon de papero al la tridimensieco de spaco, uzante la teknologion de lumplena signaligo por ŝoseoj kreitan por bona videblo dum oni moviĝas.

Ni tuj komparis la muzeon kun flughaveno aŭ superbazaro kie la orientiĝo surbaze de loĝistika koncepto estu tuj klara, kaj kie ĉiu loko estu rapide atingebla. Mi kredas, ke ni estis iel influitaj de iuj fotoj de Fischli Weiss pri banalaj ĉiutagaj lokoj, sed ankaŭ de grandaj ludilovendejoj kun ĝiaj supermezuraj signaligoj. Ĝenerale, ĉi tiu ĉiutaga estetiko fontas el la Berlina teknokulturo de la naŭdekaj jaroj, periodo en kiu ni plenkreskis, same kiel Rehberger: fortaj neonlumoj, referencoj al urba signaligo. Interesa ekzemplo estas la lumantaj signoj de Daniel Pflumm kaj liaj diversaj kluboj, inkluzive de Panasonic en forlasita buĉejo kie estis montrataj liaj obsedaj videajoj sur ekranoj pendantaj de la plafono. En tiu momento estis kreita tre efektiva, moderna prezentokulturo, tre malsimila al tiu de muzeo.



1 Hito Steyerl, Is a Museum a Factory?, E-flux Journal Reader, (Berlino: Sternberg Press, Berlino 2009).

2 Komparu: Carson Chan, Measures of an Exhibition: Space, Not Art, Is the Curator's Primary Material, The 6th Momentum Biennial Reader (Milan: Mousse Publishing, 2011).



Modeloj, per ties prezento



Kigrade arkitekturo povas ŝanĝi logikon de konkursdosiero? Ĉu eblas pritrakti la gvidliniojn de konkurso kaj ankoraŭ plilarĝigi ties framon? Ĉu konkursrespondo al ŝtata arkitektura projekto povas, anstataŭ emfazi politikan programon, inciti al daŭ rigo de la decidoprocezo?

La projektoj por la germana ambasadejo en Belgrado kaj la tiel nomata Humboldt-Forum, etnologia muzeo metita en la rekonstruotaj fasadoj de la prusa kastelo en Berlino, estas du konkursrespondoj, kiuj plilarĝigas la koncepton de la konkursprojekto kaj kreas modelojn por aktivigi la eblecojn por politika debato. En ambaŭ kazoj, la historiaj fasadoj kaj ilia rilato al la nuntempa urba kaj politika situacio estas konfliktaj.

La urbo, vidita kiel heterogena kolekto de konstruaĵoj, aperas en stato de permanenta fluo simila al ekspozicio, kie la rilato inter ekspoziciaĵoj dependas je ŝanĝo pro ŝanĝantaj kuratoraj perspektivoj. Ambaŭ projektoj konsideras la politikan direktivon por forviŝi kaj rekonstrui historian fasadon kiel agon de kuratora interveno en la pejzaĝon de la urbo. Sed kiu kuratoras la urbon?

Tiu momento de la suverena interveno fariĝas la ekirpunkto por arkitektura dizajndemarŝo, kiu proponas konstruaĵon kiel

agenton, kiu kondukas al antaŭ traktado: kiel konstruaĵo povas esti planita cele arbitracii tiajn cirkonstancojn? Kigrade arkitektura projekto kapablas reaktadi la aferon kaj atingi la politikan?

Aperis al ni ke tiu arkitektura problemo en tiuj du publikaj konkursoj ne temis pri konstrui novan fasadon sed pri kiel ni kadras kaj prezentas iun jam ekzistantan, kiu aperis politike konflikta. La antaŭa parto de la Jugoslav Second Modernism de la ambasadejo kaj la malaperiĝinta baroka kaj novklasika fasado de la muzeo konsekvence bezonas esti komprenataj kiel ekspoziciaĵoj, kiuj dependas de kadriĝo kaj prezento. Tio signifas ke oni povas ilin taksu laŭ alia perspektivo. Ĉar la projekto por la ambasadejo sugestas konservi jam ekzistantan fasadon, kiun la konkursdosiero petas ke oni malaperigu, la respondo por la muzeo kreas scenaron por la nomumita rekonstruo de forviŝita baroka fasado, cele generi prezenton de la politika rekonstruprocezo.

Por la juĝistoj de la konkurso, la konservado de la brutalisma betona strukturo kaj la uzo de la novkonstruita fasado de la ambasadejo kiel prezento por tiu artefakto finfine aperis neakcepteblaj por la celoj de tiu projekto.



**Modelo kaj prezento:
la fasono por la germana ambasadejo en Belgrado 2009.**



La plano por malrapida, eble neniam finota apliko de ĉiuj barokaj elementoj ŝajnis promesiga por la programo sed fuŝis ĉar la rekonstruo de la novklasika kupolo estis konscie flankenlasita.

Por krei prezentan situacion, por ambaŭ kazoj ni kreis modelon, ne nur de la konstruado, sed de politika kaj arkitektura dizajn-procezo: la du dizajnproponoj celas disertigi pri eblaj ŝanĝoj en la pejzaĝo de la urbo kaj eksponi la laŭhistorian situacion kiel politikan kaj konsekvence kuratoran.

Per tiuj du projektoj ni antaŭpensis la kapablon por arkitekturo fariĝi evento, kaj politika kaj kultura, konceptiganta la eventon same kiel la artisto George Brecht ĝin imagis: partituron interpretota kiel evento, kiu ne nur estas perceptata, sed kiu naskiĝas per sia publiko. Eĉ se ŝajnas nefareble aktive partoprenigi la publikon en arkitekturan dizajnprocezon, oni povus sin demandi kiel arkitektura koncepto povus konservi certan malfermecon: ĉu la realigo de projekto povas esti komparata kun interpretado de muzika partituro? Se jes, kiel povas arkitektura realigo esti komparata kun muzika interpretado, kiu dependas de la decidoj de la interpretisto anstataŭ de tiuj de la komponisto?

Difektoj

Bogdan Ignjatovic, kiu naskiĝis en Belgrado en 1912 kaj laboris kun la modernisto Dragiša Brašovan en la 1930-aj jaroj, fasonis la fasadon de la germana ambasadejo en 1970. Uzo de eksponita betono povas pensigi pri struktura ornamo simila al tiu uzita de Gordon Bunshaft en 1965 por la Beinecke Rare Book and Manuscript Library en la universitato de Yale. La fasado de la ambasadejo aperas hodiaŭ kiel difektiĝo de brutalisma arkitekturo eĉ se la strukturo malantaŭ ĝi estas disigita konstruado sen ligo kun ĝi. Daŭre, la fasado estas fragmento, kiu kontrastas en la urba pejzaĝo de Belgrado.



Ĝi ankaŭ reliefigas kiel politika fragmento, en tiu senco ke ĝi signas la finon de la Hallstein doktrino. La memtrudita okcidentgermana ekskludo en 1955 malpermesis diplomatajn rilatojn kun ŝtatoj, kiuj agnoskis GDR-on. Tial okcidentgermanaj ambasadejoj apenaŭ ekzistis en socialismaj landoj ĝis fine de 1969 kiam Willy Brandt fariĝis kanceliero kaj forlasis la Hallstein doktrinion. Li decidis reaktivigi diplomatecon kun ĉiuj ŝtatoj, kiuj agnoskis Orient-Germanion, instalante kaj konstruante novajn ambasadejojn ĉefe en la orienteŭropaj ĉefurboj.



Ŝajnas ne necese forviŝi la historian fasadon eĉ se la konstruajo malantaŭ ĝi bezonas aktualigon. Tutsimple, la fasado estas aŭtonoma rilate al la konstruajo kaj trovis sian lokon ene de la urbo kiel ekspoziciajo. Nia fasono agas favore al konservado de la difektoj de la fasado kaj, en unua etapo, izolas ilin eliminante la strukturon de la konstruajo malantaŭ ĝi. La dua movo konsistas pri provizi la fasadon per nova dekoracio, prezenta elemento kun formo de nova konstruajo. Tiu konstruajo, adaptita por plialtigitaj sekurnormoj, estas fermita solido, malfermita nur je interna korto, kiu filtras la urbon ĉirkaŭ ĝi.

La arkitekturo de la nova konstruajo de la ambasadejo akceptas la esencan disigon inter ekstere kaj interne, programo kaj aspekto. Ĝi transformas necesan alinternan orientiĝon en malsaman formon de komuniko: pli simila al muzeo, ambasadejo ne povas prezenti al la ekstero ion ajn el sia vera funkcio. Eĉ se ambasadejoj kaj muzeoj bezonas maksimumigi protektadon de siaj internoj, ambaŭ konstruajoj volas komuniki kulture kaj politikan permeablon. Tial la fasado fariĝas ekrano. Ekde kiam ni estos pretaj prezenti ĝin kiel ekspoziciajon, ĝi prezentos politikajn mesaĝojn per sia historia kaj arkitektura formo.





Modelo kaj prezento:
la fasono por la Humboldt-Forum en Berlino, 2008.

Artefakto

Agnoskinte la detruon de la militruino en 1950 kiel historian faktan, la fizika esenco de la prusa kastelo malaperis. Ankoraŭ, pentraĵoj kaj fotoj, kiuj priskribas la kastelon estis konservitaj, kaj preciza kono de la stereometrio de la historia konstruaĵo estas disponebla. Arkitektura modelo povas esti farata. Prefereble ol provi konstrui tridimensian bildon, fari plenkalan modelon signifas redoni la ekzaktan mason. Unuavide la nova konstruaĵo povus ne tre samaspekti kiel la bildoj, kiujn ni konas, do en tiu senco, tio estos fuŝa kopio. Ankoraŭ, sekvante la historian konstruon per brikoj kaj estante vide konceptita kiel konstruaĵo per nudaj brikoj simila al la duarangaj fasadoj de Neue Wache far Karl-Friedrich Schinkel, en ties strukturo kaj reliefo, la modelo estas preciza volumena kopio de la malaperiĝinta historia konstruaĵo.

La brika modelo estas konstruata solido por la etnologia muzeo en ĝia interno, kaj samtempe tiu strukturo povas fariĝi prezenta elemento, kiu frontas al la urba spaco. Depende de kontribuoj de privataj mecenatoj, ĝi povus ekspozicii ŝtonajn kopiojn de barokaj fasadaj ornamadoj, same kiel ŝtato ĝin antaŭpensis. Ĝi povus ankoraŭ resti nuda, ĉar ĝia brika reliefo estas perfekta surfaco.

La reconstruo starigos videblan debaton sen proponi finan rezulton. Ĉar partoj de la ŝtonaj ornamadoj mankas, la konstruaĵo oscilos inter esti prezentaĵo kaj ekspoziciaĵo. Aranĝita por esti kaj kompleta kaj nekompleta, la prezentaĵo estas aŭtonoma kaj sugestas la eblon haltigi la procezon je iu ajn momento. La ornamadapliko estante disigita de la fasada fasono, la eblo debati pri la adekvateco de historia reconstruo denove malfermiĝas.


La brika perimetro estas tria elemento trudota inter la muzeon kaj la kopian fasadon. Estante aŭtonoma konstruaĵo, la perimetro estas sendependa de la programo de la konstruaĵo kaj de la videbla ornamadareconstruo. Estas intera elemento, kiu estas kaj interrilata kaj hibrida. Sed la dika brikmuro ankaŭ fariĝas skulpta kaj liberiĝas el la muzea solido, je la okcidenta flanko de la konstruaĵo. Ĝi estas memtenanta inter la urba kunteksto de Unter den Linden kaj granda halo kreita antaŭ la muzeo: generika spaco malfermita al diversaj uzoj kaj legeblecoj, sojlo inter la urbo kaj la muzeo.



Trairo en la urbo

Schinkel fasonis sian Altes Museum rilate al la kastelo, sed en 1828 li ne sukcesis realigi la grandan ĝardenon kiel komunan grundon, kiun li imagis, ekzistanta inter ambaŭ konstruaĵoj. La reĝo preferis dispartigi la ĝardenon je punkto malproksima de la kastelo cele neniel rilatigi la konstruaĵojn. Anstataŭe, la kastelo estis fortikigita je ĝia norda flanko, kaj malplena skvaro estis metita apude. La perspektiva desegno de Schinkel rigardigas nin tra la kolonoj de Altes Museum trans Lustgarten kaj sur la kastelon same kiel estus unueco konektita per centra akso kun fontanoj laŭorde najbaraj al ĝi.

Estante nova konstruo, la etnologia muzeo hodiaŭ malfermas la eblecon formuli malfruan respondon al demando de Schinkel: la granda halo ene de la brika perimetro komunikas kun Altes Museum, kaj Lustgarten kadras la vidon al la urba spaco intere, ebligante movon internen kaj eksteren, truigante la perimetran muron sube ĝis la grundo. Sur ĝia supra nivelo, cirkla vojo ebligas la vizitanton eksperimenti pri la urbo kaj la granda halo laŭ ankoraŭ alia perspektivo. Kontraste, la muzeo fariĝas malsimetria meandro, kiu senligas sin el la historia volumenco de la perimetro ekstere.






Bildo jam farita

La historia kastelo estis detruita en 1950 post decido far Walter Ulbricht, ĝenerala sekretario de la tiam reganta komunistarta partio. La vakuo, kiu rezultis el tio neniam estis replenegita, eĉ se la parlamento de GDR estis konstruita sur parto de la enorma skvaro en 1976. Kio restas el la kastelo, tio estas ties bildo. Bildo, kiu ne fontas el personaj memoraroj, konsidere la generacian interspacon, sed el bildo farita el foto.




Plenskala tridimensia kopio, farita el bildigo de la kastelo presita sur plastajn membranojn, estis starigita sur la originala loko mallongtempe post la germana reunuiĝo en 1993. La iluzia modelo havigas la deziratan efektan al la publika opinio. Subite majoritato ŝajnis favora por rekonstrui la malaperiĝintan historian konstruaĵon, kaj la federacia parlamento prepariĝis al baloto.

La oficialuloj ĉe Heredo kaj Konservado sentis sin ne tre komfortaj. 'Konservado, ne restaŭrado', ilia fundamenta premiso ekde la Ĉarto de Venecio en 1964 fariĝus arkaika ekde kiam kompleta rekonstruo estus permesita. Ŝajne, bildo povus venki kontraŭ esenco, kopio gajnante kontraŭla originalo. Ŝanĝo de paradigmo okazis: la *Alterswert* de Alois Riegl estis anstataŭita de Warhola plezuro en bagatela



kopio kaj plateco. La kastelo estis ĉefe amaskomunikeca, ĉar ĝi estis nuntempa evento kaj ne plu historia fakto. Por esti produktitaj per privata sponsorado, la kopioj ne havus aĝon ĉar ili devus esti nek novaj nek malnovaj: ili estis laŭdecide ambaŭ.

La nova povas esti la malnova, se okazas ŝanĝo de loko. El-kaj re-kuntekstigo de objektoj el ilia originala loko povas transformi artefaktojn tute ne sensaciajn al veraj artefaktoj. Tamen, la barokaj fasadoj revenas al sia originala kunteksto. Estas loko, kiu ŝanĝiĝis dum la lastaj kvindek jaroj, kiam la kastelo ne plu estis, kio fakte igas la barokajn formojn ŝajni fremdaj nuntempe: ili estas en malĝusta loko kaj tial fariĝas readymades. Konsiderante ke ne spaca sed tempa logiko okazas, tiuj estas trovitaj objektoj malsamtempaj kiel la fontano de Duchamp: ili estas en la ĝusta loko sed en malĝusta tempo.



Reinterpretado

George Brecht konceptis la eventon kiel partituron interpretendan.

Spring, 1961

-Sitting on a black chair. Occurrence.

-Yellow chair. (Occurrence.)

-On (or near) a white chair. Occurrence.

Iel, tiu partituro povas esti libere interpretata. Estas tri seĝoj kiel objektoj en spaco, kaj estas instrukcio. La formo de la artverko estos tamen trovata de uzant(ar)o sekvanta la instrukcion de la artisto en tiu aranĝo. La analogio kun muzikajo interpretenda far muzikisto aŭ teatraĵo ludenda far aktoroj estas evidenta. Ĉu arkitekturo povas esti pensata kiel artverko, kiu povas esti ludata kiel muziknotoj? Reinterpretado do estus ofta praktiko en arkitekturo, kaj spacoj ne plu aspektus ĉiam samaj sed ŝanĝus sian aspekton depende de ilia tiumomenta uzo. Alproprigo fariĝas senmanka parto de la dizajnprocezo kaj kunaŭtorigas la uzanton.

la ornamado de la fasadoj fariĝas konscia ago, kiu daŭros laŭ la tempo. Ĝi fariĝos la reinterpretado de la historia fasado kiel performativa ekspozicio okazanta kun civitanoj kaj politikistoj estantaj ludantoj kaj interpretantoj. La procezo, kiu okazos estas kaj arkitektura kaj politika, kaj ĝi estas sen konata fino. Ĝi povas lasi rezulton kiel Sant'Andrea de Leon Battista Alberti en Mantua, kiu havas malsamajn fasadojn kaj kiu—en la kazo de la duarangaj fasadoj—restis kun nudaj brikoj ekde sia konstruo, nur montrante la reliefon de la plastika modulado sed neniu el la ŝtona surmetaĵo uzata je la antaŭa flanko.

Planado kaj konstruado tiel povas esti pensataj kiel disigitaj momentoj kun malsamaj subjektoj. Realigo signifas pli ol simple plenumi planon; ĝi signifas preni decidojn. En tiu senso,



Ripetado kiel originalo

En la artoj, reinterpretado kaj ripetado estas kutimaj konceptoj. Oni povas trovi ekzemplojn eĉ en la praktiko de arkitekturaj ekspozicioj, kiel montras la duoblo en 1999 de la Gartenhaus de Johann Wolfgang von Goethe en Weimar. Apud la originala konstruado oni starigis kopion por protekti la originalan internan parton kaj tamen ebligi vizitantojn ĝin ĝui. La ekspoziciaĵo duoblas: dum unu montras la originalan eksteron kaj utilas kiel aŭtentikeco-atestilo, la alia montras la internon kiel sian modelon.

Filip Noterdaeme iris eĉ pli for, kiam li proponis rekonstrui kaj redetri la Bauhaus Meisterhaus de Walter Gropius en Dessau, laŭ senfina centjara ritmo kiel anta elfaro de konstruo, detruo kaj rekonstruo. Ekzemple en 2026, la kopio devos esti konstruita, kaj en 2045 esti detruita plian fojon far atako el la aero, kaj en 2056 esti denove anstataŭata de konstruado kun duflanka tegmento simila al tiu konstruita en 1956 sur la sama loko.

Salti al koncepta—prefereble ol al materia—konservado defias nian praktikon de historia konservado kaj la tutan paradigmon el kiu ĝi fontas. Ĝi malfetiĝigas la arkitekturan objekton favore al ĝia koncepta signifo, kaj samtempe movas la

artan pritakson de teknikaj al performativaj parametroj. Portempaj konstruoj kiel la Ise Shrine en Japanio povas supozigi ĉiamecon, ĉar ruinoj kaj relikvoj el historiaj strukturoj fariĝas malpli gravaj. La ĝlosilo de tiu demarŝo estas 'iterability' kiel dirus Derrida: estante konjunkcio de 'iter' kaj 'itara', ĝi estas okazo de kaj ripetado kaj diferenco. La originaleco de ĉiu evento tiel ne kuŝus en sia unikeco sed en ĝia unika ripeto de pasinta evento. Konceptante arkitekturon kiel manieron por riveli realecon ĝin prezentante, atento estas malpli dediĉita al la noveco ol al tio, kio jam ekzistas, malpli al invento ol al alproprigo.



'Mi kredas ke la aspekto de la verko estas duaranga kompare kun la ideo de la verko, kio faras ke la ideo estas plej grava.'
(Sol LeWitt, *100 pensoj, penso15*)

Kersten Geers – Metodo kiel formo

1.

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam oni petis de la usona fotisto Lewis Balz ke li elektu librojn por *Curating the Library*, ekspozicio kaj prezento de personaj referencoj manifestitaj tra libroj, li petis la kuratoron aĉeti *When Attitude becomes Form*, katalogo de ekspozicio surscenigita en la Kunsthalle de Berno. La ekspozicio kaj la katalogo montras surprize kongruan grupon de artistoj, kiuj estis destinitaj famiĝi kiel la minimumaj kaj konceptaj praktikantoj en sia epoko.

Per la mono restanta en la buĝeto, la kuratoro devis aĉeti sortimenton el la haveblaj artlibroj far Ed Ruscha. Balz, kronikisto pri la spuroj, trenajoj, transformoj kaj restaĵoj de la proprigo kaj loĝanteco de la Amerika Pejzaĝo, ŝajnis renkontinti parencan animon en la multe pli rekta kaj eksplicita konduto de la Los-Anĝelesa pentristo. Strange, li ne estis aparte interesata pri ties pentraĵoj. Fakte, la multe pli simpla atento pri perditaj lokoj kaj banalaĵoj, kolektitaj en fotojn en la libroverkoj de Ruscha ŝajne afekciis. La seriismo de la artlibroj de Ruscha atakas temon, kiu plu estas nefigurebla en unuopa verko. Estante serio, la libroj estas pli sukcesaj en sia implica traduko de iu konduto. Kune, la libroj superfortis la handikapon de la unuopa verko, kies unikeco ne povas eskapi la impreson pri iom trudita surscenigo. Tro enigma, kaj tro romantika, unuopa verko tie prezentas 'tro da enhavo'. Kontraste al tio, por Balz, la serieco estas eskapo el tro multa enhavo en ĉiu ero, al nereakta figuro de konduto tra seria formo. Kombinante la artlibrojn de Ruscha kaj la titolon de la ekspozicio de Szeemann utilas por Balz kiel intencdeklaro, manifesto por ia kultura produktado, kiu ne baziĝas sur unikeco de la unuopa verko sed anstataŭe sur implica elfaro de ripetado.

2.

En la katalogo de 1969, estas nenio pri Ruscha. Eĉ se lia artlibro estis farita ekzakte en tiu periodo, tiam li ne ĝuis grandan sekvemon inter la Konceptistoj. Ekzistas tamen interesa verko de Sol LeWitt nomata *wall markings* (1968). Ĝi estas principe unu el la plej unuaj enkarniĝoj de liaj 'wall drawings', kiujn li disvolvis dum la sekvantaj jaroj. Faritaj per ilia priskribo, la desegnoj enkondukas radikale malsaman ekstraktadon pri la farado de arto kaj konduto koncerne la statuson de la artobjekto. La murdesegnoj konsistas en akumulo de reguloj kaj principoj—gvidlinioj—desegnometodo, kiu estas antaŭkonceptita, oni povus diri priskribita, tute sen rilato kun la kunteksto, en kiu ĉiu el ili povus fine esti plenumitaj. Unuflanke, ili ŝajnas esplori la manieron kiel la priskribometodo pri desegno povas tra ripetado akumuli sojlan signifon, ĉar la tuto de la desegnoj povas esti legata kiel serĉo pri formo. Aliflanke, ili ŝajnas prezenti ideon de (art)formo ekster ties rekta formala figuro. Oni povus sin demandi, ĉu la formo de la murpentraĵo estas la pentrita desegno aŭ ĉu estas la aro de reguloj, la gvidlinioj, la principoj aŭ la metodo, kiu priskribas eblan rezulton.

3.

LeWitt ŝajnis esti ja tro verŝajna kandidato por esti komparata kun la laboro de la germana arkitekto Oswald Mathias Ungers. La multiĝo de la kvadrato en la laboro de Ungers estas ja tro facile komparebla kun la fama serio de skulptaĵoj, liaj 'strukturoj'. Temas pri ĉieestaj aroj de transformoj de la malfermata kubo, skeletaj skulptaĵoj de senfinaj transformoj de la kvadrato. Kompari suprajn minimumismojn de Ungers kaj minimumismajn suprajn transformojn de LeWitt estus eraro, ĉar tio ne konsiderus la multe pli interesajn konceptajn kompleksecojn de la praktikoj ligitaj kun ĉiu artisto.

Ungers disvolvis sian kvadratan aranĝon meze de la 70aj jardekoj (eble lia plej verkabunda periodo), preskaŭ kiel vestaĵo de la tiam ege eksperimenta pseŭdopraktiko. Onidire, Hans Kollhoff parte deposedis kunaŭtorecon por la aparta eksterordinareco de la kvadrata fasado. Prave malprave, tio donas al la kradita kvadrato interesan devenon. Kiel pseŭdofasado, la senĉesa ripetado de la kvadrata krado fariĝis eble la plej radikala neniiganta fasonilo de Ungers. Interese, la ilo ne temas pri la ilo mem. Oni povus argumenti ke la elekto mem de armilo—ripetada krado—rivelas la celon. Estante poststrukturisto, Ungers tre bone konsciis ke la naiva kredo je ripetado kiel solvo (de la Strukturistoj) devis esti eliminata elinterne, ne prezentante hazardon kiel alternativon, sed reakirante la abundecon de ripetado, aŭ serieco, kiel ununura elirvojo. Tion farante, multobligo kaj ripetado fariĝas metodo, ne ilo. La unueco malaperas, la senĉesa sameco igas ĉiujn aliajn elementojn—tio, kio jam estas tie—protagonistoj. Ripetado en si mem solvas nenion. Rezulte, tre hibrida principaro rajtas surfi sur la ondoj de la memkreita sameco. La strategio permesis al li fari fasonojn kun rimarkeblaj sprito kaj larĝanimeco: ĉiu loko, ĉiu demando necesigis alian ege originalan hibridan tipologion. Li (kaj liaj akompanantoj) povus fari projekton sen vere fasoni ion ajn. Tial la 'maŝino de metodo' kapablas disvolvi formon. Tio estas la finofara enkarniĝo de la terura arkitekto, ĉar ĝi permesas al li malkonekti la respondecon pri lia propra formigo kaj la veran demandon: li eskapas el la respondeco solvi problemojn per formoj. Anstataŭe, Ungers nur akumulas kaj spegulas tion, kio jam estas tie. Lia seria formo troviĝas aliloke. La verkon faras la serieco de tio, kio ŝajnas esti enkarniĝoj de la samaj iloj. La surpriza metodo de Ungers havas multon saman kiel la gvidlinioj pri murpentrado de LeWitt. Ambaŭ aperas esti disvolvitaj ekster la kunteksto,

kiun ili atakas kvazaŭ la elementoj estas difinitaj antaŭ ol estu situo, kunteksto, antaŭ ol venu taŭga demando. La plej bono el la arkitekturo de Ungers ne engaĝas fasonon. Ĝi nur organizas tion, kio jam estas tie. La murpentraĵoj de LeWitt ne tiom estas malsamaj. Ili akiras sian definitivitan formon tiam, kiam ili estas plenumitaj en specifa loko. Fascine, oni neniam estas tute certa pri la statuso de la formo de specifa desegno. Ĉu temas nur pri portempa enkarniĝo de tio, kio implice estas tie, kaj tial estas subtenilo de la kunteksto de la murpentraĵo? Aŭ ĉu la fina formo estas la surloka pentraĵo? En la laboro de Ungers meze de la 70-aj jaroj, la dilemo estis evitita ĉar nenio ankoraŭ estis definitive plenumita. En la postaj jaroj, lia formala traduko de la akumulita lingvaĵo de la antaŭaj jaroj ofte similis malbonan kopion de lia propra laboro. Unu el la reguloj de LeWitt pri liaj murpentraĵoj estis ke la laboro devis esti plenumita (far iuj aliaj) kun sufiĉe da libereco por igi la plenumanton aŭtoro de la pentraĵo. Tiel, li devus interpreti, sed ankaŭ sen tro multe da kontribuo, tiel ke li ne fariĝu malbona kopio de la originalo, ia falsa Sol LeWitt. Fojfoje oni havas la impreson ke Ungers faris nur falsan Ungers, ekde kiam li konkretigis sian metodon en reduktitan kaj simpligitan formon.

Aliflanke, estas ja rilate al la relativa arta aŭtonomeco, per kiu LeWitt permesis ke siaj desegnoj estu plenumitaj, ke oni povas kompreni la esencon de la jaroj de Ungers en la Teknologia Universitato Berlino. Ĉiu raporto de studentaj projektoj de tiuj jaroj prezentas kernon de 'tiu alia praktiko', en kiu seriaz projektoj plenumitaj de diversaj aŭtoroj laŭ relative fiksita aro de reguloj sugestas eblan praktikon de metodoj kiel formo.

Bildoj

Kuehn Malvezzi, Atlas, 2012, trovita bildaro, © Kuehn Malvezzi p. 6-37

Kuehn Malvezzi, Komuna Fundamento, 2012 en La Biennale, Common Ground, ekspozicio far David Chipperfield. Fotoj montrantaj la spacajn instaladojn ĉe Sala Chini kaj antaŭ la Palazzo delle Esposizione, brikinstalajo en du partoj, 1300 x 500 x 60 cm; 1400 x 1100 x 450 cm © Kuehn Malvezzi 2012, © Foto: Giovanna Silva p. 40-49

Candida Hofer, Lauder Business School Wien III 2004, © Candida Hofer, VG Bild-Kunst, Bonn 2012 p. 53

Armin Linke, Cinema screen, Guiyu China 2005, Courtesy the Artist p. 56/57

Armin Linke, Parque del Retiro, Madrido Hispanio 2011, kun afabla permeso de la artisto p. 58/59

Armin Linke, Carlo Mollino, Teatro Regio, Torino Italio 2005, kun afabla permeso de la artisto p. 60/61

Armin Linke, Miodrag Zivkovic, Memorial Complex Šumarice, Broken Wing – Monument to Executed Pupils and Professors, Kragujevac Serbio 2010, kun afabla permeso de la artisto p. 62/63

Armin Linke, Venetian Hotel, Lasvegaso (Nevado) Usono 1999, kun afabla permeso de la artisto p. 64/65

Armin Linke, G8 Summit, Ĝenovo Italio 2001, kun afabla permeso de la artisto p. 66/67

Armin Linke, Segantini Museum, Sankta Maŭrico Svislando 2004, kun afabla permeso de la artisto p. 68/69

Armin Linke, Thongil Street, Pjongjango Nord-Koreio 2005, kun afabla permeso de la artisto p. 70/71

Armin Linke, Ettore Sottsass, Lego house in studio, Milano Italio 1999, kun afabla permeso de la artisto p. 72/73

Armin Linke, Kashiwazaki Kariwa Nuclear Power Station, children play room Kashiwazaki Japanio 1998, kun afabla permeso de la artisto p. 74/75

Armin Linke, Wild Blue, swimming pool, Jokohamo (Tokyo) Japanio 1999, kun afabla permeso de la artisto p. 76/77

Armin Linke, NASA Jet Propulsion Laboratory, Mars Yard, Pasadena (Kalifornio) Usono 1999, kun afabla permeso de la artisto p. 78/79

Armin Linke, Water shop, Nukus (Aral Sea) Uzbekistano 2001, kun afabla permeso de la artisto p. 80/81

Armin Linke, CNR National Research Council, Fermi conference hall, on the wall the Globe made by Fra Mauro in 1460, Romo Italio 2007, kun afabla permeso de la artisto p. 82/83

Armin Linke, Museum, drawings of the Tower of Babel, Babilono Irako 2002, kun afabla permeso de la artisto p. 85/85

Armin Linke, Roman Cities Project, Fori Imperiali, Romo Italio 1999, kun afabla permeso de la artisto p. 86/87

Armin Linke, El la serio Petersen Tegl Sønderborg Denmark 2012, kunlabore kun Laura Florio, kun afabla permeso de la artisto p. 96-111

Kuehn Malvezzi, Contemporary Staedel Museum Frankfurt, prezento de kolekto, serio de tri konceptaj desegnoj de projekto tiel kiel ĝi estis realigita, © Kuehn Malvezzi 2012 p. 117

Kuehn Malvezzi, Documenta11, transformo de tenejo kaj lokoj de ekspozicio, serio de tri konceptaj desegnoj de projekto tiel kiel ĝi estis realigita, © Kuehn Malvezzi 2002 p. 119

Kuehn Malvezzi, prezento de kolekto en Staedel Museum vastigajo far Schneider+Schumacher © Foto: Giovanna Silva p. 123-137

Kuehn Malvezzi, Documenta11, koncepta skizo, © Kuehn Malvezzi 2012 p. 141

Sir John Soane, Dulwich Picture Gallery, 1817, Dulwich London Borough of Southwark, plano de etaĝo, desegnita el skizo eldonita en Architects' Journal, 24a de aprilo 1985, p. 142

Kuehn Malvezzi, Documenta11, © Foto: Ulrich Schwarz, Berlino p. 143, 147, 151, 154, 162, 163, 164/165

Neues Museum Berlin, Egipta korto kun tomboj, grafiko, © Landesdenkmalamt Berlin p. 144

Friedrich August Stüler, Neues Museum Berlin, 1841, Berlino, unua etaĝo, en: Typen – ein Raumatlas, © HfG Karlsruhe 2012 p. 145

Plano, skanita faksimilo de Joachim Anton Ferdinand Fintelmann, plumdesegno kaj lavumo, priskribanta la insulon Pfaueninsel (Insulo de Pavoj), Berlino, 1810, Berlin-Archiv 1985 p. 146

Kuehn Malvezzi, Documenta11, koncepta skizo, © Kuehn Malvezzi 2012 p. 149

Uffizi, Giorgio Vasari, 1559, Florenco, unua etaĝo, en: Typen – ein Raumatlas, © HfG Karlsruhe 2012 p. 150

New York 1782, mapo tegita de stratoj tiaj, kiaj ili estis en 1880, el Report on the Social Statistics of Cities, kompilita de George E. Waring, Jr., United States. Census Office, Part I, 1886, © University of Texas Libraries, U.S. Historical City Maps p. 152

Schaulager, Herzog & de Meuron, 1998 - 1999, Bazelo, dua etaĝo, en: Typen – ein Raumatlas, © HfG Karlsruhe 2012 p. 153

Forum Pompeji, nekonata aŭtoro, 100 a.K., Pompejo, plano de la etaĝo, in: Typen – ein Raumatlas, © HfG Karlsruhe 2012 p. 155

Kuehn Malvezzi, Documenta11, koncepta skizo, © Kuehn Malvezzi 2012 p. 157

Philip Johnson staras en Lake Pavilion, New Canaan, Konektikuto, © Foto: Saul Leiter / Courtesy Howard Greenberg Gallery p. 158

Vizitantoj sur la Wilderness en Prior Park Landscape Garden, Bath, Somerset kreita de Ralph Allen kun Alexander Pope kaj Lancelot 'Capability' Brown, © Foto: National Trust Images/Arnhel de Serra p. 159

Solomon R. Guggenheim Museum. Frank Lloyd Wright, 1943, unua etaĝo, New York City, in: Typen – ein Raumatlas, © HfG Karlsruhe 2012 p. 160

Kuehn Malvezzi, Documenta11, plano de etaĝo © Kuehn Malvezzi 2002 p. 161

Schirn Kunsthalle, vestiblo kaj signaligistemo kunlabore kun Double Standards, Frankfurt 2002, © Foto: Ulrich Schwarz, Berlino p. 168

Kuehn Malvezzi, Weltkulturen Museum en Frankfurt, plano, © Kuehn Malvezzi 2010 p. 173

Maurizio Cattelan *Untitled*, 2008 (taxidermiado de hundo), 21.6 x 61 x 35.6 cm, tiel kiel ĝi estis prezentata en la ekspozicio *Partners*, kuratorita de Ydessa Hendeles ĉe Haus der Kunst, Munkeno, 2003, © Collection of the Ydessa Hendeles Art Foundation, Foto: Robert Keziere p. 177

Berlina Kastelo, Schlüterhof, Avant-corps antaŭ la granda stuparsakto, © Brandenburgisches Landesamt für Denkmalpflege und Archäologisches Landesmuseum, Bildarchiv, Neg.-Nr. 20 d 30 / 1476.29 p. 178

Bogdan Ignjatovic, Germana Ambasadego, 1970, Belgrado, © Foto: Kuehn Malvezzi p. 178, 181

Oswald M. Ungers, *Die Stadt in der Stadt - Berlin, Das grüne Stadtarchipel*, 1977, © Ungers Archiv für Architekturwissenschaft UAA p. 180

Kuehn Malvezzi, Germana Ambasadego en Belgrado, konkursrespondo 2009, tri konceptaj desegnoj de la individuaj konstru-operacioj © Kuehn Malvezzi 2012 p. 182

Kuehn Malvezzi, Germana Ambasadego en Belgrado, konkursrespondo 2009, modelo © Kuehn Malvezzi 2009 p. 183

Kuehn Malvezzi, Germana Ambasadego en Belgrado, konkursrespondo 2009, bildigo montranta la korton © Kuehn Malvezzi 2009 p. 183

Kuehn Malvezzi, Germana Ambasadego en Belgrado, konkursrespondo 2009, bildigo montranta la fasadon © Kuehn Malvezzi 2009 p. 183

Kuehn Malvezzi, Humboldt-Forum Berlino, konkursrespondo 2008, skemo de fasado kaj strukturo de la konstruaj-solido © Kuehn Malvezzi 2008 p. 184

Kuehn Malvezzi, Humboldt-Forum Berlino, konkursrespondo 2008, desegno de fasad-strukturo © Kuehn Malvezzi 2008 p. 184

Kuehn Malvezzi, Humboldt-Forum Berlino, konkursrespondo 2008, aranĝo de teretaĝo, © Kuehn Malvezzi 2008 p. 184

Kuehn Malvezzi, Humboldt-Forum Berlino, konkursrespondo 2008, bildigo, konstruado tiel kiel oni vidas ĝin el Unter den Linden, © Kuehn Malvezzi 2008 p. 185

Kuehn Malvezzi, Humboldt-Forum Berlino, konkursrespondo 2008, bildigo, publika spaco malfermita inter fasado kaj la konstruaj-solido, © Kuehn Malvezzi 2008 p. 186

Freydanck, Carl Daniel, vido el Altes Museum's peristilo al la Lustgarten kaj la kastelo, 1843 © Stiftung Preußische Schlösser und Gärten Berlin-Brandenburg/KPM-Archiv (Land Berlin) p. 187

Kuehn Malvezzi, Humboldt-Forum Berlino, konkursrespondo 2008, bildigo, truigita fasado ligas la konstruadojn al Altes Museum tra la Lustgarten, © Kuehn Malvezzi 2008 p. 187

Kuehn Malvezzi, Humboldt-Forum Berlino, konkursrespondo 2008, mapo de la loko montranta la teretaĝan aranĝon de la fasonado, © Kuehn Malvezzi 2008 p. 187

Kuehn Malvezzi, Humboldt-Forum Berlino, konkursrespondo 2008, bildigo de la okcidenta portalo de Humboldt-Forum kun la tuta rekonstruo de ĝiaj ornamajeroj, © Kuehn Malvezzi 2008 p. 188

Foto de la plenskala maketo ĉe la originala loko de la kastelo uzante presitan platan membranon, fonto: Förderverein Berliner Schloss e.V. p. 189

Kuehn Malvezzi, Humboldt-Forum Berlino, konkursrespondo 2008, tri bildigoj demonstrantaj la etapojn al plena rekonstruo de la fasado, © Kuehn Malvezzi 2012 p. 190

George Brecht, Three Chair Events, Score, Sitting on a black chair. Occurrence. • Yellow Chair. (Occurrence.) • On (or near) a white chair. Occurrence, Spring 1961, © VG Bild-Kunst, Bonn 2012 p. 191

Leon Battista Alberti, Basilica di Sant'Andrea di Mantova, foto far Paolo Monti © Milano, Civico Archivio Fotografico (in store from Fondazione BEIC) p. 191

Kuehn Malvezzi, Stadt des Anderen, la bildo baziĝas sur du el la ses partoj de la panoramo de Berlino far Eduardo Gärtner, kiu priskribas la vidon el la Friedrichswerdersche Kirche (1834), la muntajo prezentas nerealigitajn projektojn (Bibliothèque nationale de France far OMA, Chicago Tribune Tower far Adolf Loos, Newton-Kenotaph far Etienne-Louis Boullée, Atlanpole far Hans Kollhoff, kaj Bürohaus am Bahnhof Friedrichstrasse far Ludwig Mies van der Rohe) apud la famaj lokaj konstruaĵoj (Altes Museum, Bauakademie, Rotes Rathaus, Fernsehturm sur Alexanderplatz), 2002, © Kuehn Malvezzi p. 191

Le Corbusier, Ça c'est Paris, konferenca skizo, Plan Voisin, 1929, © FLC/VG Bild-Kunst, Bonn 2012 p. 193

Oswald M. Ungers, fasonado por centra Berlino, en Lampugnani / Mönninger (eds.), Berlin Morgen: Ideen für das Herz einer Großstadt, Deutsches Architektur Museum Frankfurt ĉe Majno, 1991, © Foto: Uwe Dettmar p. 193

Dankon al

Komuna Fundamento estas instalajo kunlabore produktita por la 13a Internacia Arkitektur-Ekspozicio en la Bienalo de Venecio far Kuehn Malvezzi kune kun Candida Hofer kaj Armin Linke kunlabore kun Petersen Tegl kaj Selux, kiuj per ilia subteno ebligis la realigon.

Projekto-skipo Johannes Kuehn, Wilfried Kuehn, Simona Malvezzi, Giammarco Bruno, Samuel Korn, Mira Schroeder, Nicolas Rauch, Arne Koll (Kuehn Malvezzi), Candida Hofer kaj Armin Linke

Realigo Petersen Tegl, Selux, Errico Costruzioni s.r.l., zero4uno ingegneria s.r.l., La Biennale di Venezia

Dankon al Nina S. Beitzen, Michaela Boschert, Kilian Fabich, Karin Fendt, Laura Fiorio, Gloria Hasnay, Valeska Hoechst, Johanna Hoth, Kristina Kilian, Hanne Koenig, Lisa Kuon, Sophie Lichtenberg, Lena Loy, Felix Mittelberger, Ralph Mueller, Max Muetsch, Friederike Nickel, Marlene Oecken, Christian A. Petersen kaj sia teamo, Sarah Poppel, Stefan Schulz, Jyrgen Ueberschaer, Jan Ulmer, Maxim Weirich, Francesco Zanon kaj sia teamo.

Ret-indikoj

Aŭtoroj Francesco Garutti, Kersten Geers, Kuehn Malvezzi, Hila Peleg

Artistoj Candida Hofer, Armin Linke

Fotoj Ulrich Schwarz, Giovanna Silva

Koncepto kaj Produktado Kuehn Malvezzi

Redakcio Samuel Korn

Traduko LinguaForce

Desegno kaj skemo Double Standards

Papero Icelite 150

Tajpi Berthold Akzidenz-Grotesk

Presisto NuovaLitoEffe srl, Piacenza

Eldonejo

Mousse Publishing

Via Arena 23, I-20123 Milano, Italy

www.moussepublishing.com

info@moussepublishing.com

ISBN 978-88-6749-027-1

EUR 33 — GBP 28

©2012 Mousse Publishing, Kuehn Malvezzi, la aŭtoroj kaj la artistoj.

Ĉiuj rajtoj rezervitaj. Neniun parton de tiu eldonajo oni rajtas reprodukti en ajna formo aŭ per ajna rimedo sen anticipa skriba permeso de la eldonejo.

